

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ਗੰਜਣਯੁਕ
੩੦੦੩੬੬੬੦੦੪੦੦੪

Ĉi-numere legu pri:

**150 JAROJ DE KROATA AKADEMIO
PRI SCIENCOJ KAJ ARTOJ**

**10-a KONGRESO OKAZOS EN KOPRIVNICA
FONDITA BJELOVARA ESPERANTISTA SOCIETO
KROATINOJ DIPLOMIĜIS EN POZNANO
VERKISTOJ PRI JEROŜENKO
KAJ BRONŜTEJN**

**GABRIJEL DIVJANOVIĆ (1929-1991)
SAT KONGRESIS EN SARAJEVO**

4

2011

RESUMO

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca

redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
rmilos23@gmail.com

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković,
Vida Jerman, Jozo Marević,
Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Konstantaj kunlaborantoj:

Nicole Else (Aŭstralio), Matgosia
Komarnicka (Pollando), Imre
Szabó (Hungario)

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

6 numeroj en 2011

Konto de UZE:

2340009-1110321529
(Privredna banka, Zagreb)

UEA-kodo:

uzes-y

Se vi foje pesimisme opinias ke ni malmulte aktivas, sufiĉas legi ĉi tiun numeron de "Zagreba Esperantisto" por konstati buntecon kaj multecon de nia agado.

Du la plej freŝaj novaĵoj estas elekto de Koprivnica por nia sekvontjara kongresurbo kaj (re)fondo de Bjelovara Esperantista Societo. Koprivnica per la jubilea 10-a kongreso daŭrigos la "renesancon" de nia tutlanda agado, kaj la fondo de Bjelovara Esperantista Societo parte kompensas la perdon de Esperanto-societo "Bude Borjan", kiu definitive ĉesis ekzisti la 23-an de septembro. La iamajn regulajn ĉiumerkredajn prelegojn klopodos en Zagreb daŭre organizadi Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, konforme al la propono de la estrarkunsido de Kroata Esperanto-Ligo de la 6-a de oktobro.

Kroataj esperantistoj partoprenis en la blindula kongreso en Olomouc, Internacia Junulara Semajno en Hungario, itala kongreso en Torino, SAT-kongreso en Sarajevo, sed ankaŭ kunlaboris en internaciaj projektoj kia estas la omaĝlibro al Claude Gacond. Tradicie okazis Renkontiĝo de Esperantlingvaj Verkistoj en Hrašćina.

Aparte nin ĝojigas multaj sukcesoj. En Zagreb daŭre okazos kolegio "Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto" en Filozofia fakultato, sub gvido de d-ro Velimir Piškorec, fariĝinta regula profesoro de la Fakultato. En Križevci Kruno Puškar gvidis denove sukcesan someran Esperanto-lernejon, Kaja Farszky havis sian diplomkoncerton, Dinko Matković estas premiita por vivoverko, Davor Klobučar kaj Stanko Rukelj preparis la projekton "Mažuranić", Đivo Pulitika ricevis stipendion por studi en Francio, en la urbo Zaprešić estas starigita ankoraŭ unu memor-tabulo al Esperanta poeto Josip Velebit, Marija Jerković kaj Tea Radovanović diplomigis en Poznano, DEC entreprenis esplorprojektojn pri la vivo de Tibor Sekelj kaj John Matasin/Ivan Matašin. UZE preparas festadon de 50-jara jubileo de Esperanta kampadejo en Primošteno, kaj 20-a datreveno post morto de Gabrijel Divjanović.

Ni anoncas transsiberian vojaĝon kaj informas vin pri vizitinda Esperanto-kafejo en Herzberg, kaj la mezaj paĝoj de ĉi tiu numero prezentas al vi la Kroatan Akademion pri Sciencoj kaj Artoj, kiu festas sian 150-jariĝon.

Apartan permeson ni ricevis por aperigi la eseon kiu dum ĉi-jaraj Belartaj Konkursoj gajnis honoran mencion. Ĝi aperos en du partoj pro sia longeco. Multaj temoj restis netuŝitaj, kaj do legu ankaŭ la sekvontan numeron. Kaj antaŭ ĉio subtenu "Zagreban Esperantiston" per via abono. Aparte ni invitas vin al la jarkunveno de UZE, dum kiu vi povos fariĝi ankaŭ nia membro.

La redakcio



La Jubilea

En sia 5-a (reta) kunveno, la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo traktis nur unu temon: la proponon de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, ke la jubilea 10-a kongreso de kroataj esperantistoj okazu en la 125-a jaro de Esperanto, en la nordkroata urbo Koprivnica. La Estraro akceptis la kandidatiĝon de Koprivnica por la kongreso kiun aŭspicios la Urbo Koprivnica kaj la Departamento Koprivnica-Križevci. Por la unua fojo okazos tritaga kongreso, kaj la antaŭvidata programo estos pli ampleksa kaj pli interesa ol kutime. Tial jam nun planu vian senevitajn partoprenon! Ni jubileu solene, feste, amuze, ekskurse, sed ankaŭ labore, jarkunvene, simpozio, kaj ni ripetu la belegajn travivaĵojn el nia 9-a!



**KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA
KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ
KOPRIVNICA ★ 2012**

de la 22-a ĝis la 24-a de junio

KOPRIVNICA

Vi daŭre brilas, malnova damo,
mi vin karesi pretendas.
Malhelo ne regas, sed lumon vi vestas
kvazaŭ vi min atendas.
Mi revas denove pri belaj momentoj,
sed sola kaj en malproksimo.
Jam ardas deziroj, instigoj, tentoj
promeni laŭ via pavimo.

Refreno:

Koprivnica, kara, mi baldaŭ venos
kun larmoj al via protekto.
Brakumu min kore kaj flustru fervore
bonvenon kun plena respekto.
Angulon kaŝitan al mi vi ofertu
el tempo de mia pasinto.
Kun miaj amikoj mi vivon respertu
en brilo kaj milda kortinto.

Mi aŭdis ofte preĝejan sonoron
kaj vokon de via patrono.
Mi pasis tra korso kaj sidis sur benko
sub arboj ĉe park-pavilono.
Kun vico da jaroj paliĝis memoroj,
sed ilin mi plue sopiras.
Por veni denove, por danki al ili,
tro granda deziro min tiras.

Refreno:

Koprivnica, kara, mi baldaŭ venos
kun larmoj al via protekto.
Brakumu min kore kaj flustru fervore
bonvenon kun plena respekto.
Angulon kaŝitan al mi vi ofertu
el tempo de mia pasinto.
Kun miaj amikoj mi vivon respertu
en brilo kaj milda kortinto.

La ĉi-supra poemo/kanto estas la urba himno de Koprivnica. La muzikon komponis kaj la poemon verkis konata urba komponisto Ferdinand Buhanec, la tradukon faris Josip Pleadin, kaj "Zagreba Esperantisto" aperigas ĝin kun aparta permeso de Urbo Koprivnica, kiu permesis ĝian publikan prezenton en Esperanto ankaŭ dum la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj.



LA KONGRESEJO DE LA 10-a

Kiel kongresejo de la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj servos la ĉefa salono de la koncertejo Domoljub kun 260 sidlokoj. Disponigis ĝin al la organizanto Popola malferma universitato per favora decido de la direktoro Josip Nakić-Alfirević. Por esperantistoj tiu salono havas apartan signifon, ĉar en ĝi estis okazinta ankaŭ la 7-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj en 1934.

La kongresejo estas komplete renovigita kaj tre konvena por niaj bezonoj. Ĝi estas adaptita por bezonoj de rulseĝuloj, havas je dispono teknikajn ekipaĵojn, apartan parkejon kaj troviĝas je kelkaj paŝoj de la strikta urbocentro. En ĝia proksimeco troviĝas sportaj terenoj kaj la urba parko kun refreŝiga ombro. La hotelo "Podravina" en kiu loĝos la kongresanoj troviĝas je pieddistanco. Ankaŭ la urba kaj distrikta konsilantarejoj, en kiuj supozeble okazos la jarkunveno de KEL kaj la planata simpozio, troviĝas je ne pli ol kelkminuta distanco.

Por la bezonoj de la kongresa koktelo servos ankaŭ la ampleksa korto de la koncertejo, alirebla el la interno, kaj tute izolita de la urba bruoj.



BLINDAJ ESPERANTISTOJ KONGRESIS EN OLOMOUC

 Redakcia kompilo laŭ la artikolo de Jan Přeborský



La 77-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis inter la 14-a kaj 21-a de julio 2011 en Olomouc (Ĉeĥio) kun partopreno de 56 kongresanoj el 12 landoj (Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Kroatio, Pollando, Rusio kaj Serbio).

El Kroatio la kongreson partoprenis: Franko Bakša, Antun Kovač, la trimembra familio Štoković kaj Vladimir Dujnić kiel akompananto.

La 77-a IKBE estis la tria kiu okazis en Ĉeĥio, kunorganizita de Blindulsekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

La kongreso efektiviĝis sub aŭspicio kaj kun financa apogo de: Unuiĝinta organizaĵo de nevidantoj kaj malfortevidantoj de Ĉeĥa Respubliko, vicestrino de la Regiona ofico de Regiono Olomouc s-ino Mgr. Yvona Kubjatová, ĉefurbestro de statuta urbo Olomouc s-ro Martin

Novotný, Teknika muzeo en Brno, Veolia transporto Morava, Hotelo Sigma Olomouc, eldonejo Kava-Pech Dobřichovice, Biblioteko kaj presejo por blinduloj Praha, Urbtrafika entrepreno de urbo Olomouc kaj Tyflocentrum Olomouc (organizaĵo, kiu helpas al viddifektitoj en la regiono kaj peras por ili diversspecajn servojn).

En la hotelo Sigma okazis krom oficiala inaŭguro kaj solena fermo de la kongreso ankaŭ multaj neformalaj renkontoj de partoprenantoj, diverstemaj prelegoj inkluzive de tiu kongrestema: **Plibonigado de aliro al kulturaj aranĝoj por blinduloj**, kaj du ĝeneralaj asembleoj de internacia organizo de blindaj esperantistoj (LIBE).

La kongresa programo enhavis plurajn vizitojn al historiaj lokoj de urbo Olomouc kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La kongresanoj vizitis la historian urbodomon kaj la urbocentron, la katedralon de sankta Venceslao kaj la

Ĉefdiocezan muzeon, la bazilikon kaj la zoologian ĝardenon en Svatý Kopeček, monaĥejan fortikaĵon Klášterní Hradisko, historian armean fortikaĵon en Křelov kaj partoprenis la sanktan meson en Esperanto en la preĝejo de sankta Miĥaelo.

Vizitita estis ankaŭ la bierfarejo Moritz kaj Ĉasista kabano en Horka nad Moravou. Unu tago estis dediĉita al prelego pri Karel Emanuel Macan, nestoro de la Esperanto-movado inter blinduloj ne nur en Ĉeĥio, sed ankaŭ en la mondo. La prelego okazis en Teknika muzeo de Brno. Estis vizitita ankaŭ centro por helpo al blinduloj en la strato I. P. Pavlova en Olomouc, kie la partoprenintoj ricevis informojn pri nivelo de subtenado de blindaj kaj malfortevidantaj homoj dum laborserĉado en distrikto Olomouc. Montriĝis viziteblo ankaŭ al vendejo de helpiloj, kiujn multaj partoprenantoj ne nur observis, sed ankaŭ aĉetis.

La celo de la kongreso estis, antaŭ ĉio, interŝanĝo de ekkonoj pri nivelo de helpo al blindaj kaj malfortevidantaj homoj en diversaj landoj, pri ekipado per kompensaj helpiloj kaj pri forigado de barieroj.

La kongresanoj renkontiĝis kun siaj konatoj el pasintaj kongresoj kaj trovis novajn kontaktojn kaj novajn amikecojn, pliperfektigi en uzado de Esperanto, kiu estas tradicia komunikilo por blinduloj de la tuta mondo jam pli ol 100 jarojn.

La kroata kongresano Antun Kovač kontribuis al la kongresa temo per prelego pri la Muzeo de la urbo Zagreb kaj ties alireblo por blinduloj.

Kiel eventualaj landoj gastigontaj la 78-an IKBE estis menciitaj Finnlando kaj Italio, sed la definitiva decido ankoraŭ ne estas farita.

REFONDITA



Josip Pleudín

Absolute nekomprenebla estis la situacio, ke la urbo kiu havas la Esperantan tradicion ekde 1909, dum la pasintaj du jardekoj ne posedas Esperanto-societon. Nekomprenebla, ĉar en la urbo ekzistas pluraj aktivaj kaj multaj pasivaj esperantistoj, eĉ bonaj konantoj de Esperanto. Tia urbo estas la ĉi-jara kongresurbo Bjelovar, en kiu la lasta Esperanto-societo "Tomo Vinković" malaperis en 1992, kiam ĝi perdis la societejon.

La nova ciklo de Esperantaj eventoj komenciĝis per la ideo organizi la landan kongreson en tiu urbo, pri kio ne malmultis skeptikuloj. Bonŝance, la kongreso estis escepte sukcesa kaj ĝi donis stimulon por refondo de la societo.

La iniciata komitato konsistanta el 11 personoj kunvenis la 25-an de aŭgusto kaj kunvokis la fondkunvenon por la

10-a de septembro.

Kompleze de la ĉeh-minoritata asocio "Češka obec", la iniciatintoj ricevis permeson organizi la fondkunvenon en ilia ejo. Je la interkonsentita tempo kolektiĝis tie 23 fondintoj kaj 4 gastoj (Kroata Esperanto-Ligo, Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, Esperanto-societo "Bude Borjan", Kroata Fervojista Esperanto-Asocio). La kunvenon gvidis prezidantino de la Iniciata komitato Zdenka Polašek, kiu komence skizis la historion de Esperanto en la urbo kaj kaŭzojn por refondi la societon. En la fondkunveno estis akceptita la statuto de Bjelovara Esperantista Societo (naciilingve: Društvo esperantista Bjelovara), pridiskutitaj planoj por 2011 kaj elektita la jena estraro:

Administra komitato: prezidanto Franjo Forjan, sekretario Grozdana Grubišić-Popović,

kasistino Ljerka Stilinović kaj membroj Berislav Rubčić kaj Nenad Margetić. Kontrola komitato: prezidantino Zdenka Polašek kaj membroj Vinko Grgurev kaj Željko Saks.

Dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj, kies unua kongresano estis la urbestro Antun Korušec, li persone promesis ĉian helpon al nove fondota societo. La unua afero kiun la membroj atendas, estas laŭeble rapida havigo de societejo, kio ebligus konstantan societan laboron.

Gravas menci i ankaŭ ke en la fondkunveno pluraj personoj tuj membriĝis al la societo kaj pagis kotizojn kaj aldonajn konsiderindajn monkontribuojn. Unu semajnon poste, la 17-an de septembro kvinmembra grupo de la societanoj jam partoprenis en la Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hrašćina.

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO (IJS)

 Vladimir Kamenski

Laŭ jam multjara tradicio, ankaŭ ĉi-jare Hungara Esperanto-Junularo (HEJ) organizis Internacian Junularan Semajnon (IJS). Ĉi-jare ĝi okazis en Búbánatvölgye, la apuddanuba urbeto, 10 kilometrojn de Esztergom, norda Hungario.

Samloke jam estis organizita IJS antaŭ 20 jaroj. La renkontiĝo estis organizita de malgranda, juna, sed ege ĉarma teamo. Gratulojn por la organizado.

El Kroatio partoprenis nur du personoj (Tomislav kaj mi). Ni povis ĝui la belan katedralon en Esztergom kaj urborigardadon dum la tuttaga ekskurso. En Esztergom esperantistoj, kune kun la urbaj instancoj, nomumis Esperanto-straton: (Eszperantó utca) ankoraŭ en 1958.

Esztergom ni vizitis dufoje: la unuan fojon pro urborigardado kaj la duan fojon pro naĝado kaj akvobatalo. La akvobatalo estas tradicia IJS-eca programero. Oni batalas per akvopistoloj en urba fontano. Ĉi-foje la akvobatalo okazis en Danubo mem. Mi, bedaŭrinde ne ĉeestis, sed oni povas imagi ke ĝi estis eksterordinare amuza.

Dum IJS oni povis lerni Esperanton je du niveloj: por



komencantoj kaj por progresintoj. Okazis prelegoj pri Mongolio kaj Ĉinio, kuirado de gulaŝsupo, lernado de la hungara, sportumado dum aparta sporta tago, kaj multaj aliaj programeroj.

Por la plej sportemaj estis organizita promeno tra ĉirkaŭurbaj arbaroj kun gvidanto. Dum la promeno videblis restaĵoj de iama romia muro kaj belaj panoramoj al Danubo.

Ankaŭ la nokta programo abundis. Neeviteblaj estis interkona, nacia kaj internacia vesperoj. Dum la nacia tago, la 22-an de aŭgusto (la tago de sankta Stefano), ni povis ĉe leĝera vingustumado kaj per ludoj

pli bone konatiĝi kun la hungara lingvo. Ege interesa estis ankaŭ la ideo "emisii" IJS-monon. Ĉiuj partoprenintoj ricevis iom da IJS-mono per kiu oni poste povis ludi kelkajn ludojn, ekz. kasinumi aŭ aĉetadi en aŭkcio!!! Tiuj kiuj gajnis iom da mono dum kasinumado, povis poste aŭkcie ion aĉeti. Certe la plej interesa aŭkciero estis la 20 jarojn aĝa vino, aĉetita dum la lasta IJS en Búbánatvölgye!!! La vinbotelo levis multe da ekscitiĝo, la prezo rapide ŝanĝiĝis. Fine formiĝis du grupoj ĉe kiuj kolektiĝis monstoko por la fina venko. Tamen, post la aŭkcio la pli feliĉa aŭkcianto malavare regalas ĉiujn per la malnova vino.

Fine, mi devas konfesi, ke mi ĉiam volonte revenas al IJS, ĉar ĝi estis mia unua eksterlanda Esperanto-renkontiĝo. Ĉi-jare mi eĉ (la unuan fojon) gvidis ian programeron dum Esperanto-aranĝo. Temis pri gvidado de grupo pri matena kurado (jogging). La matenan kuradon ne multaj partoprenis, sed ĉiam almenaŭ unu persono kuris kun mi.

La ĉi-jara IJS okazis inter la 16-a kaj 22-a de aŭgusto, kiu pli-malpli estas kutima tempo por IJS.





Tatjana Loskutova



LAŬ TRANSSIBERIA FERVOJO AL LA UK EN VJETNAMIO

Julie 2012 ĉiu esperantisto havos okazon efektiviĝi 2,5-semajnan vojaĝon tra Rusio kaj Ĉinio (pli ol 12.000 km) al la 97.a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, Vjetnamio. Partoprenontojn de la karavano atendas konatiĝo kun vidindaĵoj de Moskvo, vizitoj al koncerto de rusa danco kaj al muzeo de rusa vodko. Per trajne, laŭ Transsiberia fervojo* kiu ligas du kontinentojn (Eŭropon kaj Azion), la Esperanto-karavano atingos la urbon Irkutsk kaj la faman Bajkal-lagon. En Pekino lokaj geesperantistoj konatigos la karavananojn kun vidindaĵoj de la ĉinia ĉefurbo.

Provizora itinero:

Moskvo – 3 tagoj (loĝado en hotelo en dutilaj ĉambroj, perpiedaj ekskursoj tra la ĉefurbo, vizitoj al Kremlo, la Ruĝa Placo, la Novvirgulina monahinejo, koncerto de rusa danco (aŭ balet), la muzeo de la rusa vodko, moskvaj metrostacioj, ŝipumado laŭ Moskva-rivero, renkontiĝo kun lokaj geesperantistoj).

Moskvo – Irkutsko – 3,5 tagoj (trajnumado tra Siberio, 5.160 km).

Irkutsko - Bajkal-lago – 3,5 tagoj (veturo al Bajkal-lago 280 km, loĝado en turisma bazejo ĉe la lago, ŝipumado laŭ Bajkal-lago, vizitoj al ĉirkaŭaĵoj, vidindaĵoj de la urbo Irkutsko).

Irkutsko – Pekino – 3 tagoj (trajnumado per internacia trajno, 3.800 km).

Pekino – 3 tagoj (loĝado en hotelo en dutilaj ĉambroj, ekskursoj tra la ĉefurbo, vizitoj al Granda Muro kaj ĝiaj muzeoj kaj panoramo, al Imperiestra Maŭzoleo, Ĉiela Altaro, la Malpermesita Urbo, Somera Palaco, renkontiĝo kun lokaj geesperantistoj).

Pekino – Nanning – Hanojo – 2 tagoj (kombinita vojaĝo, 2.860 km: trajno/noktumado en hotelo/buso).

Nuntempe mi povas informi nur pri provizoraj prezoj kaj startdato de la planata vojaĝo, ĉar en la nova jaro nepre aperos iuj ŝanĝoj, espereble ne grandaj.

La projekto startos la 9-an aŭ la 10-an de julio 2012.

La prezo de la restado en Rusio kaj la vojaĝo ĝis Pekino egalos al 1.300 eŭroj aŭ 1.150 eŭroj depende de la kategorio de la kuŝvagono de Moskvo ĝis Irkutsko. Aldoniĝos elspezoj por manĝoj, kiujn ĉiuj pagos mem, krom en Irkutsko kaj ĉe Bajkal-lago, kie ĉio estos inkluzivita.

La prezo de la restado en Pekino kaj la vojaĝo ĝis Hanojo egalos al 300 eŭroj (ankaŭ sen manĝoj).

La antaŭajn Esperanto-karavanojn tra Rusio (en 2007 al Universala Kongreso en Japanio kaj en 2010 al 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Mongolio) partoprenis geesperantistoj el Belgio, Francio, Italio, Nederlando, Portugalio, Rusio, Usono. Pri siaj impresoj kelkaj el ili verkis artikolojn en diversaj Esperanto-revuoj kaj gazetoj. La nederlanda esperantisto G. Berveling priskribis sian sperton de Transsiberia trajnumado kun grupo de geesperantistoj en "Vojaĝimpresoj tra Siberio kaj Japanio", kiu aperis en "Fonto" en 2008.

La vojaĝon organizas s-ino Tatjana Loskutova, UEA-delegito en Ivanovo, Rusio (lota49@mail.ru).

* Konstruita antaŭ iom pli ol 100 jaroj, la transsiberia ĉefvojo estas nun potenca dudirekta elektrifikita fervojo. Ĝi estas unika kaj ĉi-unikeco konsistas ne nur en ĝia longeco (ĉirkaŭ 10.000 km de Moskvo ĝis Vladivostoko), sed ankaŭ en tio, ke ligiĝante kun rusiaj transportaj koridoroj, ĝi provizas al aziaj landoj la plej kurtan aliron en Eŭropon. Pro tio la Transsiberia fervojo aspektas kvazaŭ parto de "surtera ponto", kiu komenciĝas ĉe bordoj de Pacifiko kaj finiĝas ĉe Atlantiko.

EKZEMPLODONA AKTIVECO EN KRIŽEVCI

Redakcia kompilo



Krunoslav Puškar, la juna profesoro de angla kaj germana lingvoj, dum julio kaj aŭgusto ĉi-jare gvidis du laborejojn pri Esperanto en la Urba biblioteko "Franjo Marković" en Križevci. La unua okazis inter la 18-a kaj 29-a de julio kaj la dua inter la 8-a kaj 19-a de aŭgusto. Partoprenis dudeko da diversaj personoj, ĉefe junaj, kiuj mallonge okupiĝis pri lingvistiko, frekventis rapidan kurson de Esperanto laŭ la Zagreba Metodo, skribis teston kaj ricevis diplomojn. En la biblioteko la partoprenintoj havis je dispono la necesan literaturon por prunti kaj uzi ĝin, kaj ambaŭ laborejoj estis senpagaj, dank' al la entuziasmo de la preleginta profesoro Puškar.



INICIATA RONDO EN PETRINJA

Sabaton, la 15-an de oktobro, enkadre de maron-festo sur la monto *Hrastovička gora*, renkontiĝis la iniciata rondo por fondo de Esperanto-societo en Petrinja. En la nuntempa Unua elementa lernejo en Petrinja, antaŭ kvardeko da jaroj la instruistino Marija Horžinek instruis Esperanton kiel elekteblan studobjekton al lernantoj de superaj klasoj (5-a ĝis 8-a). La tiam organizita Esperanto-grupo havis la nomon

"La Espero". Dezirante renovigi la Esperantan aktivecon kaj helpi fondi la societon, la rondon iniciatis Esperanto-societo "Sisak" kaj subtenis la strebojn Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj kaj Dokumenta Esperanto-Centro. Al tiu grupo aliĝis ankaŭ profesoro Josip Štajcar el Petrinja. La kunvenon en Hrastovička gora partoprenis 9 personoj, kiuj formis la komisionon por fondo

de la societo konsistantan el: Josip Štajcer kaj Vesna Sigur el la Unua elementa lernejo de Petrinja, Srećko Radulović el Sisak kaj Slavko Šantek el Glina.

La komisiono preparos proponon de statuto kaj organizos fondkunvenon.

Samtempe oni klopodas funkciigi rapidan semajnfinan kurson de Esperanto por la loĝantaro de Petrinja.

Srećko Radulović

La festotago okaze de la 80-jariĝo de fama svisa esperantisto Claude Gacond, kunvenigis la 27-an de aŭgusto en La Chaux-de-Fonds pli ol cent personojn el deko da landoj, por partopreni la ceremonion en la Urba Biblioteko, kie funkcias la CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia), la institucio fondita de la jubileanto mem. Pri Claude Gacond parolis la prezidanto de la urba ekzekutiva konsilio Pierre-André Monnard kaj la direktoro de la biblioteko Jacques-André Humair, kaj nome de la esperantista komunumo la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Probal Dasgupta, Katalin Kováts, Ilona Koutny kaj Tomasz Chmielik. Reinhard Haupenthal prezentis laŭdacion al la jubileanto, kaj Irmi Haupenthal transdonis al li la unuan ekzempleron de la festlibro "Instrui Dokumenti Organizati" eldonitan de Edition Iltis por ĉi-okazo.

FESTOTAGO HONORE AL CLAUDE GACOND



 Stefano Keller

LAŬDACIO POR CLAUDE GACOND

 Reinhard Haupenthal

**La Chaux-de-Fonds
sabato, 2011-08-27**

Monsieur le Directeur de la Bibliothèque
de la Ville de La Chaux-de-Fonds,
cher Monsieur Humair,

estimataj reprezentantoj de la svisa
kaj de la internacia Esperanto-movado,

estimataj koleginoj kaj kolegoj,
damoj kaj sinjoroj,

kara Andrée Gacond, tre kara Claude.

Ni kuniĝis ĉi tie, por omaĝi kaj riverenci al viro, kiu, per sia laboro kaj per sia vivo-verko, donis aŭtentan stampon al Esperanto kaj al la tuta internaci-lingva movado, kies materia substrato estas CDELI. Vi, kara Claude, dum via tuta vivo estis plen-sanga pedagogo: instrui infanojn kaj adoltojn iĝis via dua naturo, juniga fonto el kiu vi ĉiam ĉerpis

forton. Vi semis kaj semis konstante: kiel Sizifo vidis la esencon de sia laboro en la rulado de la ŝtono, tiel same vi ne lasis vin iriti de eventualaj missukcesoj kaj fiaskoj. Viajn strebojn ĉi-rilate dokumentas pluraj svisaj Esperanto-periodaĵoj. Dank al ĉi zorga kronikado de la eventoj, nenio dronis en la maro de forgeso. Tio validas ankaŭ por viaj instru-spertoj, multaj labor-planoj, via laboro esplora. Tra jar-dekoj vi organizis: jen ski-feriojn, jen Kulturajn Semajnfinojn, jen kolokvojn kaj seminariojn. Efektive, en ĉi tri verboj Instrui Dokumenti Organizati resumiĝas via vasta agado kaj al ili ĉio cetera substitueblas. Ne mirige, ke ili kvazaŭ aŭtomate postulis titoliĝi kiam ekestis la ideo pri fest-libro. Mokemuloj avertis, ke la inicialoj de Instrui Dokumenti Organizati formas la vorton "Ido". Eble ili pretervidis, ke neniam vi havis tuŝo-timan fobion: en CDELI vi hejmgigis la idistojn, unu long-jara kunlaboranto via estis occidentalisto kaj ankaŭ la reprezentantoj de Interlingua tiris la ĉapelon pro via praktikata plan-lingva ekumenismo. La miriga fato volis, ke vi ludu ĉi rolon kaj ke ĉi rolon vi ludas modele kaj sukcese. Donante al vi la



nomon Claude, eble eĉ viaj gepatroj providence kaj subkonscie direktiĝis de ĉi fato. Ĉar kion alian signifas la literoj de ĉi nomo, se ne jenon:

- C = Centre (centro)
- L = Langue (lingvo)
- A = Auxiliaire (helpa)
- U = Universelle (universala)
- D = Documentation (dokumentado)
- E = Esperanto

Tiele la lulilo de CDELI najbaris vian propran. (Mi vidas kunŝoviĝon de kapoj sin demandantaj pri la signifo de Gacond: nu, la kabalistikan dekodigon de la genetika kodo mi espere liveri en via... 85-jariĝo.)

La ideo kunplekti por vi, kara Claude, apartan fest-libron tuj trovis spontanen konsenton. Tamen, bedaŭrinde, ies ombroj tro longis por transsalto: pro motivoj ne specife zamenhofaj ili preferis ne enjungi sin. Sed la ĉaro tamen ekiris: estiĝis bunta bukedo da kontribuoj divers-temaj. Rekte al la jubileulo rilatas la antaŭparolo de Jacques-André Humair kaj la artikolo de Stefano Keller kiu verkis enkondukan eseon sub la titolo "Servoprete via". Sub malfacilaj cirkonstancoj Marie-Louise Mûnger pristudis la humanisman kaj pacifisman pens-manieron de Claude Gacond surbaze de elektitaj radio-prelegoj. Kun la jubileulo mi dividis la taskon kompili la bibliografion de liaj publikigaĵoj.

Nature dominas artikoloj el la sfero de la esperantologio kaj interlingvistiko: Detlev Blanke analizas la revuon *Planlingvistiko*, Tazio Carlevaro parolas pri la Ido-poeto Andreas Juste, Jean-François Fayet prezentas la kompleksan pri Komintern kaj la Esperanto-demando, Herbert Mayer pristudas fruajn ekzemplojn por la senpera verbigo de adjektivoj kaj substantivoj, Sébastien Moret analizas la negativan sintenon de du francaj lingvistoj: Jacques Damourette kaj Edouard Pichon; Gonçalo Neves sublupeigas la rilatojn de Zamenhof al Volapük, Josip Pleadin rakontas la historion de la revuo *La Suda Stelo* kaj Annakris Szimkat malkovris artikolon de Adolf Schmidt en kiu, jam en 1931, ĉi lasta parolas pri la inkunabloj de Esperanto.

Pedagogiaj temoj kompreneble ne mankas: Renato Corsetti prezentas al ni mitojn, fortojn kaj malfortojn de la Cseh-metodo, Nancy Fontannaz priskribas la klerigan rolon de CDELI, Ilona Koutny rilatigas verbajn strukturojn kun rimarkoj pri ties instruado, kaj fine Mónica Mólnar konatigas nin kun tri iniciatoj de lernejoj korespondoj en Svislando: la entrepreno *Grajnoj en Vento* de Marcel Erbetta, la laboro de Claude Gacond mem kaj la rolo de la lernejo la Granda Ursino, kie ŝi aktivas.

Kelkaj kolegoj okupiĝis pri la biografioj de esperantistaj agantoj: Tomasz Chmielik pri la rolo de Edmond Privat dum la unua mond-milito lige kun la sendependiĝo de Pollando; Probal Dasgupta pri sia sam-landano Lakshmiswar Sinha kaj Dietrich


Weidmann pri la "fenomeno Baur". Unu kontribuon mi ŝatas aparte reliefigi: tiun de Katalin Kováts. Malgrau ŝia komenca opono kontraŭ mia tempropono pri Tiberio Morariu kiun ŝi sentis milda trudo, ŝi ne nur liveris intereso-kaptan artikolon pri la rumana Cseh-instruisto, sed tia-grade profundiĝis en la materion, ke en majo, en Stokholmo, ŝi povis prezenti en la ĉeesto de la retrovita filino tutan libron pri Morariu. La kromefikoj...

Fine, ne povas manki kontribuoj pri bibliotekoj: Ana María Molera rakontas la historion de la plan-lingva kolekto de sia patro Ramon Molera, mi mem elmontris la zigzagajn vojojn de la privata biblioteko de Schleyer kiu, pasint-jare, trovis definitivan hejmon en la Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno.

Kaj iel, last-momente, kvazaŭ ekstervice, Irmi Hauptenthal povis aldoni dokumenton ne nur surprizan, sed rekte sensacian. Ŝi sukcesis akiri leteron de Louis de Beaufront, pri kiu mito-manuuloj asertas, ke lia vera nomo estis Louis Chevreux, al la franca matematikisto Charles Laisant. En ĉi letero verkita iom antaŭ la Bulonja kongreso, la markizo konsiliĝas kun Laisant pri tio, ke Zamenhof estu kandidato por la Nobel-premio por paco.

Tiele kunplektiĝis bunta honor-krono, kiu, espereble, delektos ne nur vin, kara Claude, sed ankaŭ multajn aliajn legantojn.

Mi nun petas la eldonistaron transdoni la unuan ekzempleron al nia jubileulo.



Mendebila ĉe:

EDITION ILTIS, La Saousse, FR-84340 Malaucène

Tel.: +33.(0)4.90.65.28.33

E-mail: editioniltis@aol.com

Prezo: 36,00 eŭroj (+ aŭfranko)

78-a ITALA KONGRESO DE esperanto

 Jolanda Józsi

La 78-a Itala Kongreso de Esperanto okazis inter la 20-a kaj 27-a de aŭgusto 2011 traktinte la temon "Kaj nun ni estu eŭropanoj" kaj jubileante la 150-an datrevenon de la nacia unuiĝo.

Ĝi okazis en Torino, la unua ĉefurbo de unuiĝinta Italio, ĉirkaŭprenata per Alpoj. Torino estas konsiderata unu el la plej riĉaj urboj en Italio. La rivero Pado trafluas la urbon, en kiu troviĝas 16 milionoj da kvadrattmetroj da verdaj terenoj kaj 400 kilometroj da arboprovizitaj stratoj. Ĉi tie kunvivas harmonie la antikva kaj la nuntempa artoj.

La kongresejo troviĝis en la surmonteta Villa Gualino, donante komforton kaj eblecojn por ĉiuj riĉaj programoj de la kongreso: seminarioj, arta, kultura kaj junulara programoj, koncertoj, amuzaj programeroj.

Partoprenis 270 kongresanoj el 24 landoj, inter kiuj invititoj el la urbestro de Torino kaj la sekvontjara kongresurbo Mazaradelvalo (Sicilio), prezidanto de UEA Probal Dasgupta kaj aliaj.

Dum la malfermo siajn salutojn al la kongresanoj adresis s-ro Nicola Minnaja, respondeculo pri kultura programo, s-ro Renato

Corsetti, prezidanto de IEF kaj aliaj. Dum la oficiala inaŭguro festoparoladon prezentis la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Probal Dasgupta. La reprezentanto de la urbestro de Torino esprimis ĝojon pro tiu ĉi aranĝo, dezirante sukceson al la kongreso kaj agrablan ĉeeston por la partoprenantoj. La urbestro de la sicilia urbo Mazaradelvalo invitis ĉiujn al tiu urbo dum la venonta kongreso okazonta inter la 18-a kaj 25-a de aŭgusto 2012 kun la temo "Sed homoj kun homoj, la pluretna intuicio de Zamenhof". En tiu urbo Itala Esperanto-Federacio starigos Centron por Interkulturo kaj Esperanto. Ĝi estonte estos studejo kaj lernejo pri tiuj temoj.

La kongresaj programoj estis tre riĉaj kaj variaj, kontentigante ĉies dezirojn kaj atingante la planitajn celojn.

Dumkongrese estis organizitaj kunvenoj por membroj de Itala Esperanto-Federacio, diversaj organizaĵoj kaj fakaj grupoj. S-ro Renato Corsetti, la ĝisnuna prezidanto de IEF transdonis la taskon al la nova prezidanto Aldo Grassini.

"Verda Foiro" estis la programo celanta prezenti novajn librojn

eldonitajn de IEF kaj eksterlandaj asocioj, societoj, fakaj asocioj. Libroservo funkciis tuttempe.

La plurtagaj seminarioj estis la verda fadeno etendiĝanta tra la tuta kongreso. La temon A: "Kaj nun ni estu eŭropanoj" gvidis Bertrand Hugon, kaj la temon B: "Dramaturgia literaturo" Paul Gubbins.

Okazis la sub-programo Grundtvig, kiu estas ero de la Programo por Dumviva Lernado (Lifelong Learning Program), kunfinancata de Eŭropa Komisiono. Tiu pogramo celas helpi realigi la eŭropan spacon kiel lokon por dumviva lernado, subteni lernadon de lingvoj kaj lingvan diversecon, plifortigi la rolon de dumviva lernado en la maturiĝo de sento pri eŭropa civitaneco, kies bazo estas kompreno kaj respekto de homaj rajtoj kaj demokratio, kaj en la plifortigo de toleremo kaj respekto rilate aliajn popolojn kaj kulturojn.

La tasko de Grundtvig estas provizi plenkreskulojn per novaj vojoj por plivastigi iliajn konojn kaj kapablojn. Ĝi celas plenumojn el diversaj eŭropaj landoj, dezirantaj koni pli profunde la koncepton pri

Eŭropo, prefere aktivajn en neregistaraj organizoj.

Por la tutsemajna seminario A: "Kaj nun ni estu eŭropanoj" estis elektitaj 20 eksterlandanoj kaj 8 italoj, kaj la seminario okazis en lingvo internacia Esperanto.

Ĝi okazis en kvin sesioj. Je la fino de la kurso la partoprenintoj konis ĝenerale la historion kaj la strukturojn de Eŭropa Unio, la variajn eŭropajn kulturojn kaj ilian esprimadon per la diversaj lingvoj, kun atento al sistemo KER (Komuna Eŭropa Referenc-Kadro) koncerne la lernadon de fremdaj lingvoj. La kursanoj diskutis pri la nunaj eŭropaj celoj, emfazis la solvotajn demandojn kaj proponis eblajn solvojn. La partopreno en ĉi tiu

kurso kuntrenis la plifortiĝon de supernacia eŭropa sento.

Ĉe la seminario B: "Dramaturgia literaturo", estis atingitaj la rezultoj rilate al Esperanto-verkado internacie, ne subtenante la tradukaĵojn en tiu fako, instigante la partoprenantojn al kreo de originalaj teatraĵoj en lingvo internacia Esperanto, kaj al plia interesiĝo pri la dramaturgia literaturo.

Ĉar la du seminarioj meritis apartan prezentadon, sekvis ilia publika resumado. S-ro Hugo Bertrand, la gvidanto de la Seminario A, espimis sian kontenton pri pozitiva rezulto de tutsemajna seminario, kontribuo de la partoprenantoj kaj akiro de novaj konoj pri la seminaria temo.

Mi mem, estante prezidantino de Internacia Esperanto Kultur-Turismo el Rumanio, prezentis resumon pri "Multkultureco, lingva diverseco".

Rezulte de la Seminario B pli multaj personoj devus interesiĝi pri originala dramaturgio. La seminaria gvidanto opinias pli grava kreadon de originalaj teatraĵoj en Esperanto, kiuj riĉigus la dramaturgian literaturon.

Sume okazis dekdu diverstemaj, interesaj prelegoj, prezentitaj de konataj kaj renomaj prelegantoj.

Dumkongrese okazis kursoj de Esperanto kaj de la itala, kaj KER-ekzamenoj C1-nivelaj. La organizantoj meritas ĉiujn laŭdojn.

SURVOJE AL SUPERKATALOGO DE ESPERANTAJ BIBLIOTEKOJ

 **Roland Rotsaert**

Dum la Universala Kongreso en Kopenhago kelkaj komputilistoj kaj bibliotekistoj kunvenis kaj i.a. kreis Google-liston 'biblioteko' (<http://groups.google.com/group/biblioteko/about>). Tio estis unu plia paŝo en la realigo de projekto pri kiu multaj jam delonge revas.

Jam en 1991 Martin Weichert kaj kelkaj kunlaborantoj klopodis krei ciferecan katalogon de la Esperanto-literaturo. Kvankam estis intereso ĉe bibliotekoj, ili ne sukcesis. Mankis taŭga programaro kaj interreto tiutempe apenaŭ estis konata.

Ne nur estas bezonata taŭga programaro, ankaŭ necesas koni la bibliotekojn. La UEA-jarlibro mencias nur etan parton el ili. En 1997-1998 Christian kaj Sabine Darbellay kolektis informojn pri centoj da bibliotekoj Esperantaj aŭ kun Esperanta sekcio. La laboro ne estis finita

kaj la informoj nun ne plu estas aktualaj.

En 2006 Ziko van Dijk, tiam respondeca pri la UEA-arĥivo kaj la Biblioteko Hodler, lanĉis la ideon krei la katalogon laŭ wiki-principoj: ĉiu interesita persono povas kunlabori kaj registri informojn. Post esploro evidentiĝis ke wiki apenaŭ uzeblas por biblioteka projekto. De tiu ideo tamen ankoraŭ restas la retpaĝo <http://www.bretaro.net>.

Intertempe okazis studlaboroj, kies rezultoj estas grupigitaj en du libroj: *Plansprachliche Bibliotheken und Archive - Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, Berlin 2008 (Interlinguistische Informationen 15)*. (germanlingve) kaj *Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj - Aktoj de la kolokvo en Vieno, Rotterdam, UEA, 2009*. En tiuj libroj estas grupigitaj diversaj gvidlinioj, spertoj, konsiloj, ktp.

La projekto de superkatalogo nun estas 'adoptita'

de E@I (www.ikso.net, grupo de esperantistaj komputilistoj). Gvida persono estas Marek Blahuš, kiu transprenis multajn ideojn de Miroslav Malovec. La teknologio kaj la programaro multe evoluis dum la pasintaj jardekoj kaj nun estas je dispono. Dum la venontaj monatoj oni difinu kiuj el la disponeblaj iloj estu uzataj. Multe dependos de la disponebla tempo de la E@I-kunlaborantoj, kiuj havas multajn taskojn!

La jam menciita listo 'bibliotekoj' estas nur unu el la necesaj preparaj paĝoj. Roland Rotsaert kolektas informojn pri la plej grandaj (duon-)publikaj Esperanto-bibliotekoj, ĉar unualoke tiuj devos kontribui al la superkatalogo. Plej urĝa verŝajne estas provizora katalogado (kaj reta aperigo) de ĉiuj ciferecigaj projektoj. Nuntempe oni ĉie ciferecigas Esperantajn librojn kaj revuojn, ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ ĉe Google kaj Gutenberg. La risko estas granda ke la sama verko estas ciferecigita plurfoje.

BILDVORTARO KAJ OKLINGVA PROVERBARO


Petro Desmet informis nin, ke li tre baldaŭ prizorgos novan eldonon de Bildvortaro (Duden) kaj de la Oklingva Proverbaro (Zamenhofa fakto). Li volas montri ke la nova eldono de Bildvortaro ne deziras konkurenci al PIV, sed kontraŭe instigi al nepra uzado (kaj aĉetado, se necesas) de PIV! En la Bildvortaro mem li daŭre, referas al PIV, al ĉiuj iom interesaj bildoj en PIV, kaj ankaŭ al aldonaj terminoj!

JUBILEO DE LA ESPERANTA POETO DURO RAŠAN

En 2012 ni festos la 100-jaran datrevenon de la Esperanta poeto Duro Rašan (1911-1983) el Novigrad Podravski. Li estas konata kiel regiona poeto kiu verkis nacilingve kaj dialekte, sed konserviĝis ankaŭ liaj Esperantaj poemoj, aperintaj en la broŝuro "Dorno en la koro". Lastajn jarojn de sia vivo li pasigis en Koprivnica, la sekvontjara kongresurbo de kroataj esperantistoj, kio fariĝas bona momento por rememori pri la datreveno de lia naskiĝo.

TROVITA NEKONATA PORTRITO DE ZAMENHOF

Dokumenta Esperanto-Centro el Durdevac aĉetis de privata



posedanto la ĝis nun nekonatan portreton de L. L. Zamenhof, kiun en 1988 desegnis la renoma kroata karikaturisto Petar Pismestrovic el Zagrebo.



MEDITADOJ EL LA ANIMO

Legio de Bona Volo (LBV) eldonis en Esperanto la libron *Meditadoj el la animo* de brazila ĵurnalisto Paivo Netto. La verkon tradukis Paulo Sérgio kaj la antaŭparolon verkis la pola reĝisoro Roman Dobrzyński. La lanĉo okazis en São Paulo, dum la 8-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto. Pli ol 400 mil ekzempleroj de la portugallingva versio, titolita *Reflexões da Alma*, estis venditaj en Brazilo kaj Portugalujo. La celo de la tekstoj estas helpi la leganton kompreni sian spiritan naturon kaj sian rolon en la mondo. Ĉe la hejmpaĝo www.bonavolo.com oni povas trovi pli da informoj kaj fari mendojn.

TUTAMERIKA KONGRESO

Sub la temo *Procezoj de regiona integriĝo en la amerika kontinento: la rolo de Esperanto*, inter la 9-a kaj 13-a de julio en São Paulo (Brazilo) okazis la 8-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto, sed ne nur ĝi. Samtempe kaj



samloke okazis ankoraŭ du aliaj gravaj aranĝoj: la 46-a Brazila Kongreso de Esperanto kaj la 31-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, ĉiuj kune nomataj "Kongresego". Kiel la kongresejo servis la ejoj de Faculdade Santa Marcelina (FASM). La kongresegon partoprenis ĉirkaŭ 350 kongresanoj, el kiuj kvindeko estis eksterlandanoj el dudeko da landoj. En la densa programo kun 4 ĝis 6 samtempaj programeroj, ĉiu povis trovi ion por sia gusto: fakaj prelegoj, movadaj forumoj, lingvokursoj diversnivelaĵoj, kursoj pri fotado, poezio, librolanĉoj, ludoj por infanoj kaj plenkreskuloj ktp. Ne ekzistis aparta ekskurstago, sed ĉiu mem povis plani siajn ekskursojn, kiujn organizis turisma entrepreno funkciinta en la kongresejo. Enkadre de la kongresego okazis Unua Internacia Esperanta Kinofestivalo organizita de Aleksander Osincev el Rusujo kaj subtenita de TEJO. Organizitaj de Katalin Kovács, okazis ankaŭ la ekzamenoj laŭ Komuna Eŭropa Referenc-Kadro (KER), je la nivelo B1, B2 kaj C1. En la solena malfermo la himnojn (brazilan kaj Esperantan) ludis la Orkestro de Militista Polico de São Paulo. Laŭ sinjoro Alberto Fernández-Calienes Barrios, la Tutamerika Kongreso de Esperanto okazis en Brazilo ĉar "en Brazilo troviĝas la plej granda Esperanto-movado de la regiono. Se Brazilo alvokas, ĉiuj ĉeestas. (...) Ĉi tiu movado ebligis bonkvalitan rapidŝanĝon de ĉiuj aliaj Esperanto-movadoj en la kontinento".

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA

En la Universala Kongreso en Kopenhago estis elektita nova estraro de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE): José Antonio Vergara iĝis la nova prezidanto, kaj kunordigos la laboron de Claude Labetaa, Mélanie Maradan, Francesco Maurelli kaj Johannes Mueller.

HONORAJ MEMBROJ KAJ PREMIITOJ DE UEA

En Kopenhago estis proklamitaj novaj **Honoraj membroj de UEA**: **Detlev Blanke** (Germanio), **Renato Corsetti** (Italio) kaj **Rob Moerbeek** (Nederlando). **Premio Onisaburo Degučii** iris al **Hori Jasuo** (Japanio), kaj estis atribuitaj pluraj diplomoj: **Diplomo pri Elstara Agado al Jorma Ahomäki** el Finnlando pro elstara loka agado kaj gazetara informado pri Esperanto; **Augusto Casquero** el Hispanio pro instruado de Esperanto en Ĉinio kaj Vjetnamio; **Helmar Frank** el Germanio pro elstara antaŭenigo de Esperanto kiel lingvo de scienco, precipe pere de la Akademio Internacia de Sciencoj; **François Xavier Gilbert** el Francio pro longtempa gvidado de la Koresponda Servo Mondskala de UEA; **Heidi Goes** el Belgio pro sukcesa agado por disvastigo de Esperanto en Indonezio; **Mireille Grosjean** el Svislando pro laboro por Esperanto en Afriko kaj utiligo de Esperanto por interkultura edukado; **Andrzej Grzębowski** el Pollando pro antaŭenigo de turismo pro Esperanto kaj pro agado sur la kleriga kampo; **Géza Kurucz** el Hungario pro modela redaktado de la revuo "Juna Amiko". **Diplomo pri Elstara Arta Agado al Kim Henriksen** el Danio kaj **Jean-Marc Leclerc (Jomo)** el Francio pro longtempa kontribuo al la Esperanto-muziko; **Carmel Mallia** el Malto kaj **Abel Montagut** el Katalunio pro elstara kontribuo al la Esperanta poezio.

MALFERMA TAGO EN ROTERDAMO

La sekva Malferma tago en la sidejo de Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo okazos la 26-an de novembro. Speciala gasto estos Spomenka Štimec kun la temo pri Tibor Sekelj.

UEA-KOTIZOJ POR 2012

La kotizoj de Universala Esperanto-Asocio por kroatoj en 2012 laŭ kategorioj estos la jenaj: MG 5,00 eŭroj, MJ(-T) 12,00 eŭroj, MA(-T) 31,00 eŭroj, SA 19,00 eŭroj, Kto 11,00 eŭroj, SZ 62,00 eŭroj. La kotizojn akceptas la Ĉefdelegito de UEA Boris Di Costanzo, Set. Carmen Sylve 19, 51410 Opatija; telefono (051) 715 309; retadreso bdesperanto4@gmail.com

98-a UK EN ISLANDO

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio en la UK en Kopenhago anoncis la decidon,

ke la 98-a Universala Kongreso de Esperanto en 2013 okazos en Rejkjaviko (Islando).

35-a HUNGARIA ESPERANTO-KONGRESO

La 35-a hungaria Esperanto-kongreso okazos inter la 3-a kaj 6-a de novembro 2011 en urbo Szolnok. Invititaj de najbarlandaj esperantistoj, kroatoj volus organizi grupvojaĝon kaj per tio konfirmi la Interkonsenton inter KEL kaj HEA subskribitan dum la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar. Se iu interesiĝas kunvojaĝi, tiu bonvolu kontakti Dokumentan Esperanto-Centron dec.kroatio@gmail.com. Ĉiuj kostoj, kiuj inkluzivas la vojaĝkostojn per trajno de Koprivnica al Szolnok kaj reen, loĝadon (3 tranoktoj) kaj po tri manĝojn tage kaj ĉiujn programojn, egalas al 1.100,00 kunaĵoj. Ekveturo estas planata la 3-an de novembro el Koprivnica.

BONAN RESANIĜON AL AMBAŬ!

Yenovk Lazian

Mi ne ŝatas atendejojn ĉe la kuracistoj. Foje mi hontas pro mia tute viva vizaĝkoloro. Kaj ŝajnas al mi, ke la pacience sidantaj gemaljunuloj silente malaprobas mian sanan aspekton.

La sola allogaĵo en la kuracistaj atendejoj kuŝas en revuoj, foje interesaj, foliumi kiujn aliloke mi tute ne havas okazojn.

Unu fojon kiam mi estis leganta treege interesan artikolon, la helpantino de la kuracisto invitis min eniri.

Mi turnis min al la apude sidanta maljunulo kaj diris ke mi cedas mian vicon. Li kontente eksaltis kaj kuris en la kabineton.

Dek minutojn poste li eliris murmurante ion subnaze. Kiam niaj rigardoj interkruĉiĝis, li diris al mi:

- Ĉu vi iam aŭdis ke la hepatmalsanoj estas kuracataj per masaĝo? La doktoro estas strangulo, mi eble iru ĉe iu alia...

Kiam oni finfine vokis min, mi pene ekstaris. La dorsodoloro trapenetris ĝis la genuo, kaj ĉiuj muskoloj de la kruro estis streĉitaj.

- Do nudigu vian ventron kaj kuŝigu tien ĉi. La kuracisto knedis mian ventron de la dekstra flanko.

- Montru al mi vian langon... Nu, bone, tute rozkolora! Do daŭrigu preni la preskribitan kuracilon kaj post unu monato venu por fari la necesajn analizojn.

Ostoknare kaj dolore mi ekstaris. Jes, la maljunulo kaj mi interŝanĝis la malsanojn kaj la kuracmetodojn. Por la kuracisto ni ambaŭ estis du nuraj paĝoj en la komputilo, du ciferecaj dosieroj. La unua havis tute sanan dorson, kaj la dua tute sanan hepaton.



KROATA AKADEMIO PRI SCIENCQJ KAJ ARTOJ

150 jaroj

 Radenko Milošević

 Zrinka Šilhart

La 150-jara historio de Kroata akademio pri sciencoj kaj artoj, ekde la fondiĝo en la jaro 1861, estis markita per multaj politikaj grandaj eventoj. Jaron pli frue, en 1860, la imperiestro Francisko Jozefo la Unua iomete liberigis la soci-politikan vivon en la monarkio, kaj la nova Konstitucio akceptita en tiu jaro, certigis la sendependecon de kroata parlamento (*Sabor*).

En la jaro kiam fondiĝis la Akademio, estis fondita ankaŭ la "Imperiestra komisiita konsilantaro" (*Carsko namjesničko vijeće*) kiel "organo respondeca al la popolo". Per la imperiestra decido kaj la postulo de kroata parlamento en Zagrebo, anstataŭ la "Imperia reĝa tribunalo" estis fondita "Banusa tribunalo de reĝlandoj Dalmatio, Kroatio kaj Slavonio", kiu celis disigon de ligoj kun Aŭstrio kaj Hungario. Ĉar tio ne plaĉis al la aŭstria imperiestro kaj hungara-kroata reĝo, la parlamento estis disigita. En tia situacio komencis agi kaj akiri la influon Kroata jura partio, sub la idea gvidado de Ante Starčević kaj Eugen Kvaternik.

Sekve, la Akademio travivis ĉiujn turbuladojn de la jura, ŝtata kaj politika vivoj de kroatoj kaj Kroatio en la Aŭstri-hungara imperio. La Akademio estis entrita en diversajn politikajn eventojn en la triflankaj rilatoj inter Aŭstrio, Hungario kaj Kroatio, ne nur pro aŭstri-hungaraj, sed ankaŭ pro la enlandaj kialoj. Akcentendas, ke la ideo pri fondo de nacia scienca institucio en Kroatio fontis el la kroata popola renesanco (nomita ankaŭ *Ilira renesanco*), kiun publikigis Ljudevit Gaj en 1836 en la gazeto "*Danica*" (= matena stelo). La parolado de la episkopo Josip Juraj Strossmayer el la jaro 1860, kiu postulis memstarecon de Kroatio kaj ĝian sendependecon de Hungario, aparte post lia disputo kun la dalmataj separatistoj ne volontaj akcepti la unuiĝon de Dalmatio kun la banusa Kroatio, starigis lin kiel ĉefrolulon de la tiama kroata politika vivo. La banuso Josip Šokčević kunvokis la 10-an de decembro 1860 banus-konferencon kaj la episkopo Strossmayer sendis al la banuso la sumon de unuaj kvindek mil

forintoj destinitaj por fondo de la Akademio.

La plej proksima kunlaborinto de la episkopo Strossmayer, kaj poste la unua prezidento de la Akademio, Franjo Rački, formulis la celon: "Se nia popolo iam disvolvos sian literaturon surbaze de propra lingvo, ĝi ne skuiĝos ĉe ĉiu blovo de politika neceteco, kaj la popolo ne timos se iu estonta ministro intecos forpeli nian hejman lingvon flanken. Certigo de nacia estado postulas, ke oni pli rapide organizu Akademion jugoslavian". Ĉe la fondiĝo de la Akademio Rački diris ankaŭ la jenon: "Nia Akademio estas fondita, antaŭ ĉio, por servi al la kroata popolo, por gardi ĝian lingvon, historion, juron, literaturon..."

Per la konstitucio estis garantiata al kroatoj sendependeco de hungara influo en la banusregiono, kaj tio certigis, ke la parlamento povis memstare decidi pri la estonta Akademio. J. J. Strossmayer oficiale iniciatis la fondon de la Akademio ĉe la parlamenta kunsido la 29-an de aprilo 1861, kio estis unuanime akceptita. La imperiestro kaj reĝo Francisko Jozefo post kvin jaroj, la 4-an de marto 1866, akceptis la multe ŝanĝitajn regulojn de Jugoslavia akademio pri sciencoj kaj artoj.

En la komenco ekzistis la ideo, ke la Akademio estu kumuna institucio de ĉiuj slavaj



popoloj en la eŭropa sudo. Tion atestas la latina titolo de la Akademio ("Academia scientiarum et artium slavorum meridionalium" = Akademio de sciencoj kaj artoj de sudaj slavo), kiu estis ĝis antaŭ nelonge videbla ĉe la granda enirejo. La impriestra registaro el Vieno ne volis akcepti la komencan formuligon pri taskoj kaj celoj de la Akademio, respektive ke ĝi estu "prizorganto kaj subtenanto de sciencoj kaj artoj ĉe la slava sudo inter kroatoj, serboj, slovenoj kaj bulgarioj, en popola spirito kaj komuna klerigado".

Tuj post la akcepto de la ŝanĝitaj Reguloj de la Akademio, kroatia parlamento sendis al la reĝo proponon pri dekse unuaj membroj: Janez Bleiweiss, Mirko Bogović, Vatroslav Jagić, nobelo Ivan Kukuljević Sakcinski, Šime Ljubić, Antun Mažuranić, Pavao Muhić, Franjo Rački, Jovan Subotić, Josip Schlosser-Klekovski, Bogoslav Sulek, Josip Torbar, Adolf Veber Tkalčević, kaj Živko Vukasović. Ne estis akceptita la nomumoj de Ivan Kukuljević Sakcinski kaj Antun Mažuranić, laŭdire pro iliaj politikaj opinioj, sed eble ankaŭ pro tio ĉar pro ilia nomumo ne estis proponitaj Ljudevit Gaj, Petar Preradović kaj Ivan Mažuranić.

La ideo pri komuna Akademio de ĉiuj sudslavaj popoloj rapide malaperis. Baldaŭ post la fondiĝo de Jugoslavia akademio estis fonditaj Serba akademio kaj Bulgara akademio. La Akademio post tiu tempo kelkfoje ŝanĝis la nomon. Dum la dua mondmilito ĝi nomiĝis Kroatia akademio de sciencoj kaj artoj (HAZU), sed en la komunisma-socialisma periodo la nomo estis denove ŝanĝita al Jugoslavia akademio pri sciencoj kaj artoj (JAZU), malgraŭ tio ke ĉiu popolo en la tiama sudslava ŝtato fondis sian propran akademion. En la memstara Respubliko Kroatio la 26-an de junio 1991 *Sabor* decidis ke la akademio reprenu la originan nomon proponitan ĉe la fondiĝo - Kroatia akademio pri sciencoj kaj artoj (HAZU).

La ĉefajn celojn de la Jugoslavia akademio priskribis prezidinto Rački ĉe la solena kunsido la 27-an de julio 1867: "... La Akademio transdonos al la manoj de la popolo la tutan nacian literaŭraon el la pasinta tempo, por uzi kaj ĝui ĝin, kaj por fieri pri ĝi...". "La historioj de lingvo, libro,

kaj juro estas nur partoj de la historio en kiu devas respugliĝi la historio de nia popolo...". "... Nia Akademio akceptos ĉiun progreson de scienco kiu havos apogon en iu ajn ŝtato aŭ ĉe iu ajn popolo...".

Sekvis malbonaj labor-cirkonstancoj post la Aŭstri-hungara interkonsento en la jaro 1867. Kroatia *Sabor* malakceptis tiun interkonsenton, pro kio ĝi estis disigita. La disigon sekvis la teroro de la altrudita banuso Levin Rauch. La situacio iomete trankviligis post kiam banuso fariĝis Ivan Mažuranić (1873), sed iom post iom komenciĝis malkonkordo inter kroatoj kaj serboj, kion kaŭzis la aŭstria okupacio de Bosnio kaj Hercegovino.

La Akademio havis tre abundan kaj ampleksan eldonan agadon. En la unua jardeko estis eldonitaj multaj historiaj dokumentoj kaj malnovaj ĉartoj, historiaj studoj kaj verkoj de malnovaj kroataj verkistoj. Sekvis diversaj analoj, kronikoj kaj diplomata leĝaro, dekunu volumoj pri kroataj latinistoj. Arkivo pri ekonomia historio de Kroatio ampleksas 21 volumojn, Granda vortaro de kroat(-serba) lingvo 97 volumojn, Kajkava literatura vortaro 10 volumojn, eldoniĝis la famaj "Kontribuoj por kroat-historia vortaro" de

Vladimir Mažuranić ktp.

Kroatia akademio pri sciencoj kaj artoj apud *Matica hrvatska*, Kroatia ŝtata arkivo kaj Nacia kaj universitata biblioteko estas la kernoj de la sciencia kaj arta laboroj en Kroatio kaj eĉ pli vaste. La listo da diversaj sciencistoj, verkistoj kaj artistoj el niaj naciaj rondoj estas granda, kaj ili grandparte konsistigas la mondan heredaĵon. Bedaŭrinde, multaj elstaruloj ne estis membroj de la Akademio.

Inter la prezidintoj de la Akademio, krom la unua Franjo Rački, troviĝis pluraj tre elstaraj sciencistoj, verkistoj kaj politikistoj. Por ni esperantistoj tamen la plej interesa inter ili estis Tomislav Maretić (prezidinto de 1915 ĝis 1918), fama pro sia prelego "Pensoj pri artefarita monda lingvo". En ĝi jam en la jaro 1891 li menciis, ke eble Esperanto pro sia simileco al la latina, povus esti unu el la verŝajnaj solvoj por internacia neŭtrala lingva komunikado.

Fontoj:

***: "125 godina djelovanja Jugoslavenske akademije znanosti i umjetnosti", Zagreb, 1991.
Antoljak, S.: Pregled hrvatske povijesti. Split, 1994.
Mijatović, A.: Iz riznice hrvatske povijesti i kulture. Zagerb, 1996.



TUTMONDAJ DEFIOJ DE LA KLIMATOŜANĜIĜO (1)

Adrienne Pásztor

Originala Esperantlingva eseo

HONORA MENCIO en Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, 2011

1. KONFUZIĜINTAJ SEZONOJ

Ĉiutaga demando de niaj tagoj estas la klimatsanĝiĝo, kiu jam estas babildadtemo ankaŭ inter nefakuloj. La homo dum sia vivo spertas, ke ĉio ŝanĝiĝas, ĉio moviĝas. Oni ekkonas la rondiron de fenomenoj de la naturo, la ciklajn reaperojn, kiujn ni nomas sezonoj. Sed nuntempe forte rimarkeblas, ke la kutimaj sezonkriterioj jam tamen ne plu estas karakterizaj. Miksiĝis la ĝis nun konataj trajtoj de la sezonoj kaj novaj, ĝis nun nekonataj aŭ raraj fenomenoj estas rimarkeblaj.

La temposentumon de la migrantaj birdoj embarasas la ŝanĝiginta vetero. Foje ili pli frue alvenas ol kutime, sian foriron prokrastas al malfruo. Okazas, ke ili restas ĉi tie por vintrumi, poste pro la neatendite alvenintaj fortaj frostoj ili ne akiras nutraĵojn, malsatmortas aŭ frostiĝas. Ĉe la rivereto Szinva transfluanta nian urbon, jam tra pluraj vintroj mi vidis riveretborde vintrumantajn cikoniojn. Se ili ne trovas manĝaĵojn en la akvo, ili malsatmortas, malvarmiĝas kaj baldaŭe mortas. En plej bona kazo oni portas ilin en la urban bestoĝardenon aŭ en la ornitologian observejon, kie ili ricevas konvenan prizorgadon kaj post unu jaro ili povos ekvojaĝi al sia vintra restadloko. Pro la klimatsanĝiĝo ankaŭ la nutraĵbestoj de la cikonioj iĝas pli malfrue manĝeblaj, pro kio la cikoniidoj ne povas ricevi ĝustatempe la neceskvantan nutraĵon. Pro tio ĉi, ankaŭ la cikoniidoj, la cikoniida populacio

estas damaĝita. En Hungarujo ĉiujare 80.000 cikoniidoj eloviĝas. En 2010 nur 20.000 restis vivaj, kaj oni povis kalkuli kun forflugo de tiu kvanto.

Ankaŭ la hungarlanda hirundpopulacio daŭre malkreskas jam de dek jaroj. Laŭ informoj: la malpliigo de la kvanto de la tri hungarujaj hirundospecioj estas atribuebla parte al la klimatsanĝiĝo, parte al tio, ke la homo ĝenas la birdojn en iliaj loĝlokoj. Sekve la malmultaj hirundoj jam ne povas efike helpi la repremon de invadoj de kuloj vivantaj apud la riveroj kaj aliaj "vivantaj akvofluoj".

Ni devas mencii ankaŭ la pereon de fiŝoj de niaj akvoj havantaj vivantaron, ekzemple en la rivero Tibisko kaj lago Balatono. Ĉi tiu formorto de la fiŝpopulacio validas koncerne ne nur nian patrujon, sed ankaŭ la rumanian marbordon kaj la nord-polusan marakvon. La akvoj varmiĝas pli grandmezure ol estas la varmo en kia ĝis nun alktimigis vivi la tie vivantaj fiŝspecioj kaj aliaj vivuloj. La pli varma akvo enhavas malpli da en akvo solvita oksigeno. Tial pereas la fiŝoj. Pro ilia pereado, el la nutroreto malaperas la nutraĵo de la polusaj ursoj, balenoj kaj de la homoj en la arktaj regionoj.

2. AKVO KAJ ALIAJ DAMAĜOJ

Travojaĝinte grandan parton de Hungarujo en julio de 2010 mi vidis, ke plejparton de la ĝistiamaj agroj kaj herbejoj kovras akvo ekde aprilo. La grundo ne povis sekiĝi pro la ofta

kaj abunda pluvo kaj ties sekvo estis pli grandmezure aperinta kampa akvo, pro kiu sur la kampoj jam nestiĝis la akvaj birdoj. Krome, dum nia vojaĝo, la aspekto de la vastaj marĉoj etendiĝantaj ĉe la bordoj de Tibisko kaj ĉirkaŭ la trajnaj relparoj estis surpriza, kvazaŭ ne estintus river-reguligo dum la 19-a jarcento!

Nuntempe en Hungarujo oni kulpigas la klimatsanĝigon pro la nekutima pluvo falinta la 21-an de junio 2010. Tiutage rana pluvo torentis sur la vilaĝon Rákóczifalva en departemento Jász-Kiskun-Szolnok. Kiel novaĵo aperis dum 2010 la pluv-torentoj, inundoj, kototorentoj, termoviĝoj, ŝtormoj plagintaj preskaŭ ĉiun regionon de Hungarujo. Ankaŭ mi konstatis en urbo Miskolc du termoviĝojn. La samaj fenomenoj efikis detruite ankaŭ en Ĉinio kaj en Pakistano. Laŭ la informo, la naturkatastrofo atinginta Pakistanon estis la kvaroblo de la damaĝo kaŭzita de la cunamo en la jaro 2006, detruinta la areon de la Pacifika oceano. Ĉi tie mi mencias informon ricevitajn de mia brazila korespondantino Liette Lęła, laŭ kiu la 5-an de aŭgusto 2010 neĝis en Brazilio, kio estis tre rara evento. Tiusezone la norda parto de Brazilio havas la varmecon de 40°C gradoj, skribis mia amikino.

3. DEGELAS LA GLACIO DE LA POLUSOJ KAJ EKFILTRIĜAS LA METANO

Artefaritaj satelitoj kaj esploristaj grupoj daŭre observas

la Nordan-poluson kaj la glacian de Glacia-mar. Degelas la polusa glacio. Se tiu procezo tiele progresos, la akvo devenanta el la degelaĵo altigos la marnivelon kaj dum la sekvaj jarcentoj povos subakvigigi la insularon de la oceanoj, pluse ankaŭ la malalte kuŝantaj teritorioj de Mezeŭropo. La klimatsanĝiĝo pli forte efikas sur la Nordan-poluson dum la lasta duonjarcento, ol alie tion montras la indikoj mezuritaj antaŭ 1979. Ekde la jaro 1979 per satelitaj observadoj oni mezuras la glacian de la Norda-poluso. La pli malfrua, pli densa mara glacio ŝajne estas malaperanta - avizis la glaciokaj neĝajn datumojn registranta kaj analiza observa grupo de la Unuiĝintaj Nacioj (NSIDC). /Klimatoprotekta Magazino ozonenetwork.hu/

Ankaŭ dum la pasinta duonjarcento somere plurfoje estis senglacia akvo sur la Norda poluso. Komenciĝis la metan-likado de la grundo nun liberiganta de la frosto en la iam konstante frostiĝintaj nordaj regionoj, kaj el la marfundo. El la grundo la bakterioj liberigas karbondioksidon kaj metanon, kio plifortigas la varmiĝon - skribas la reta eldono de la semajna gazeto *Der Spiegel*. La metano estas dudek kvinoble pli forta forcejefika gaso ol la karbondioksido. (INDEX; la 3-an de januaro de 2011).

La marnivelaltiĝo ĝis la jarcentfino povus superi la pli frue mezuritajn datumojn. La koralajn rifojn, kiuj donas hejmon al unu triono da specioj de maraj estaĵoj, donas vivmedion al duonmiliardo da homoj, kaj protektas la marbordon kontraŭ la marinundoj, minacas la acidiĝo de la oceano - asertas ekspertoj pri la klimato.

4. KLIMATSANĜIĜOJ EN LA PASINTO DE LA TERO

Ĉi tiuj fenomenoj ne estas solsolaj, ja dum jarmilionoj

de la ekzisto de nia Tero multfoje okazis klimata ŝanĝiĝo. Proksimume ses grandaj malvarmiĝaj periodoj de la terhistorio estis senteblaj sur la surfaco de la tuta Tero. La ĝis nun lasta glaciepoko finiĝis antaŭ ĉ. 10. 000 jaroj. Tiu ĉi lasis spektaklo-riĉajn spurojn sur la norda hemisfero. Ekzemple en Finnlando fundojn de pli ol 50.000 lagoj elkavis la glacio. Dum la interglaciaj pli varmaj periodoj, tre variis la vivantaro de Tero, multloke per tropika temperaturo kaj loko per tre sekaj periodoj. La diversajn epokojn la geologio pruvas plej bone, kiam el la elfosajoj malkovriĝas ŝtoniĝintaj restaĵoj de malnovepokaj vivuloj. Inter la hipotezoj pri tio, kio povis kaŭzi la pereon de la malnovtempe vivintaj animaloj - kiuj kaŭzoj ne tuŝis ĉie ankaŭ la flaŭron - la plej verŝajnaj kialoj povis esti: malvarmiĝo de la klimato, malaltiĝo de la CO₂ enhavo de la aero, bruska pliintensiĝo de la kosma radiado, ĝenerala regreso (retiriĝo) de la maroj, ŝanĝiĝo en la salokaj mikroelemento-enhavo de la marakvo, pliintensiĝo de la radioaktiveco sur la tersurfaco, kaj krome ni devas paroli ankaŭ pri la vulkanaj erupcioj kaj la falo de meteoritoj.

5. ĈEFAJ FAKTOROJ DE LA KLIMATO

Laŭ la plej akceptitaj teorioj la ĝenerala klimato de nia planedo dependas de kunaj koeficientoj de tri faktoroj:

- konsisto de la atmosfero (laŭ la supozata kvanto de la karbondioksido + metano + akvovaporo),
- situo de la kontinentoj,
- modifiĝoj de orbito aŭ rotacia akso de nia planedo,
- eventuale la situo de Suno en nia galaksio.

Ekzistas signoj pri tio, ke pro la homa agado estas ŝanĝiĝanta pli grandmezure la atmosfero, pro la kresko de la

enhavo de karbondioksido kaj metano.

Laŭ mia opinio, se ni volas difini la klimaton de iu regiono, ni devas konsideri la topografiajn kaj hidrografiajn datumojn de la teritorio, la statistikajn indikojn pri la rilatoj de kvanto de precipitaĵo (inkluzive tion, ĉu la teritorio havas abundan neĝon aŭ ne, kiom da glacipluvoj falas po somero, kia estas la direkto kaj la forto de la vento, kian temperaturon havas la aero, kiom varmas la vento, kian nubaro-kovritecon havas la teritorio, kiel longas la somero, kiom malvarma estas la vintro). Krome, gravas ankaŭ la kvanto de la sunradiado kaj ankoraŭ multaj aliaj, ĉi tie ne menciitaj indikoj.

6. SAMTEMPE PLURSPECIA KLIMATO

Hungarujo situas sur la limoj de pluraj klimataj terenoj. Ĝian veteron formas la orientkontinenta, la okcidenta-oceana, kaj la nord-polusa aeramasoj kaj la suda-sudokcidenta mediteranea efiko. La mediteranea efiko estas plej forta en la suda parto de Transdanubio, sed demonstreblas koncerne kaj la flaŭron kaj la faŭnon en la sudaj flankoj de montaro Mátra kaj Bükk, eĉ iom malpli forte ankaŭ en la Sátor-montoj (de Tokaj ĝis Abauzszántó). La atlantikan efikon la Alpoj devias el sia originala direkto, pro kio ĝi alvenas al ni el la nordokcidento.

La de tie ricevitaj ventoj portas la plimulton da precipitaĵo falinta sur la teritorio de la lando. Pli malgranda estas la efiko alvenanta el la sudo kaj sudoriento. La hungaria klimato estas laŭ la sunagada divido modera. Pro sia geografia situo ĝi ne havas veterajn ekstremumojn. Pro la eta enlanda latitud-diferenco kaj la neglekteblaj altecodiferencoj, la klimato de Hungarujo estas sufiĉe unueca, sed nature la influoj de la ortografiaj faktoroj tamen estas senteblaj.

Hungarujo situas inter la 45° 45' kaj 48° 35' de norda latitudo, proksimume meze inter la ekvatoro kaj la Norda poluso. Pli ol duono de ĝia surfaco troviĝas sub 200-metra ternivela alteco, kaj nur 2 procentoj superas 400-metran altecon. En Hungarujo la somero daŭras almenaŭ 3 monatojn, ĝia meza temperaturo superas 18° C, kaj somermeze la varmo ne malofte superas eĉ 35° C. Vintre alternas unu la alian la malmildaj kaj pli facilaj periodoj, sed la nombro de monatoj dum kiuj la temperaturo multe superas 0° C ne plias ol tri.

La jara meza temperaturo estas inter +8 kaj +12° C, kaj relative alta estas ĝia variado.

La ĝenerala valoro estas la plej malalta en januaro, - 4 ĝis -7° C, kaj en julio estas la plej alta: + 25 ĝis +30° C. La plej malaltan temperaturon, -35° C, oni mezuris la 16-an de februaro 1940 en urboparto de Miskolc (nuntempe Miskolc-Tapolca). La plej alta temperaturo, +41° C, estis mezurita en urbo Kiskunhalas, la 20-an de julio 2007. La nombro de la sunradiaj horoj varias inter 1700 kaj 2015. Ĝi estas la plej alta en la ebenaĵo kaj la plej malalta en la montara regiono. Tio ĉi estas grava faktoro por la agrokulturo. La averaĝa kvanto de la precipitaĵo estas 500-1000 mm. En la ebenaĵo 500-600 mm, kaj en la montara regiono 800-1000 mm. La distribuo de la precipitaĵo ŝanĝiĝas ankaŭ dum la jaro. Du maksimumoj rimarkeblas: la primara en la frusomeraj monatoj (aprilo-junio), kaj la sekundara aŭtune (oktobro). La plej malmulte da precipitaĵo falas januare-februare. La nord-okcidenta vento estas la reganta. Miaopinie gravas la dumjara ŝanĝiĝemo de la precipitaĵ-kvanto inter la ekzamenitaj jaroj. La pli granda parto de la jara precipitaĵo falas dum la somera duonjaro.

Hungarujon trapasas ĉiujare pli ol 660 frontoj, el kiuj 80% estas malvarmaj kaj 20 procentoj varmaj. La pli malgranda parto de la precipitaĵo ligiĝas al tiuj ĉi frontoj. Plejparte

la precipitaĵo aperas kiel pluvo, sed dum 15 ĝis 60 tagoj ĉiujare neĝas. La neĝkovraĵo kaj en la ebenaĵo kaj en la montoj ekzistas dum 25-50 tagoj.

Inter la kvar sezonoj estas grandaj diferencoj. La plej malvarma monato estas januaro, la plej varma julio.

La taga temperatur-ŝanĝiĝo estas sufiĉe granda. La jara meza temperaturo estas ĉ. 13° C, la maksimumo 38° C, la minimumo ĉ. -10° C.

La printempo komenciĝas komence de aprilo, kaj tion akompanas grandaj pluvadoj. Pro ĝia kaprica vetero la popola onidiro nomas ĝin freneza aprilo. La somero estas seka kaj varma. La aŭtuno estas malvarmeta, nebula kaj pluva kaj la vintro relative mallonga, modere malvarma kaj ordinare seka. Kelkfoje oni povas baniĝi en admirinde belega sunbrilo.

Du pli pluvaj tempoj (frusomero kaj aŭtuno) kaj du pli sekaj periodoj (mezo de vintro kaj fruaŭtuno) alternas.

La jara averaĝa ventorapideco estas 204 m/sekundo. La klimataj indicoj enhavas plejparte averaĝajn valorojn (jara meza temperaturo, jara meza valoro de la temperaturŝanĝo, averaĝa precipitaĵ-kvanto ks.) Malantaŭ la averaĝaj valoroj kaŝas sin diversaj temperaturaj kaj precipitaĵkvantaj jaroj, unikaj veteraj datumoj de jardekoj kaŝiĝas - laŭ la hungarlingvaj budapeŝtaj kaj landaj veter-prognozaj datumoj de la Hungara Meteologia Instituto.

7.

SCIENCA PROGNOZO KAJ POPOLAJ ANTAŬDIROJ PRI VETERO

Krom la veterprognozoj de la landa meteologia fakservo bazitaj sur matematikaj kalkuloj, la popolo konsideras ankaŭ la veteraŭgurojn elformiĝintajn dum la plurjarcentaj observadoj. Ĉi tiuj pruvigaĵoj ankaŭ nun plejparte

ĝustaj. Mi mencias kelkajn el inter tiuj, kiel interesaĵojn. Se la 2-an de februaro elvenas la urso el sia groto kaj tiam sunradias, la urso ektiminte sian ombron rekuras en sian grotkavon. Tio signifas, ke la alvenon de printempo oni devas ankoraŭ longe atendi. Aŭ: se pluvas dum Vince-tago, pleniĝos la kelo. Ties senco estas: se la 5-an de aprilo (nomtago Vincento) pluvas (post floriĝo de la vito, tempo de la vinberkreskiĝo), tiam la mastro havos tre multan vinon. Kaj alia: se nomtagon de Katalin (Katarina, la 25-an de novembro) frostas, kristnaske malseka vetero estos atendebla, do pluvas. Kaj la sekvajara vetero estos tia, kia estis la vetero inter la nomtago de Luca (Lucia, la 13-an de decembro) kaj Kristnasko (la 25-an de decembro).

8.

KIO ESTAS PRUVITA - KAJ KIO NE ESTAS

Laŭ la libro *Klimato de Hungarujo* de Zsigmond Róna (Sigmundo, 1909) en Buda (parto de Budapeŝto) en la jaro 1700 oni fondis la unuan hungarujan meteorologian observan stacion kiel parton de eŭropa reto. Do, en nia patrujo jam pli ol ducent jarojn okazas sistemaj atmosferologiaj mezuradoj. Ankaŭ en Hungarujo estas atesteblaj en la lasta triono de la 20-a jc. ekzemple la kresko de la averaĝaj valoroj de la temperaturo de la vintra duonjaro kaj ioma precipitaĵkvanta malpliigo, ĉefe en la aŭtunaj monatoj. Ne estas pruvite ĉu tiuj simptomoj devenas de la natura klimatsanĝiĝo, aŭ ili vere estas la postsekvaj de la tutmonda varmiĝo provokitaj per la homa agado. (Laŭ la Landa Meteologia Servo: Temperaturo de Hungarujo - Meteologiaj informoj). Tiuj modifoj estas tiom etaj, ke laŭ mia opinio - sed ankaŭ laŭ aliuloj, oni ne devas timi, ke en la proksima estonteco okazos tropika klimato aŭ glaciigo.

(daŭrigota en la
numero 5/2011)

LA PROJEKTO “MAŽURANIĆ”

✍ *Davor Klobučar*


En septembro 2011 aperis nova libro en la kroata Esperantujo. Sed laŭ la enhavo ĝi estas samtempe nova kaj malnova. Kial?

Temas pri la eposo “La morto de Smail-agao Ĉengiĉ”, aperinta en 1846, perlo de la kroata literaturo kaj deviga legaĵo en lernejoj. Mi emas kompari la verkon kun tiuj de Homero kaj diri, ke temas pri kroata “Iliado”.

Esplorante la historion de la Esperanta movado en Kroatio, mi rimarkis, ke tiu ĉi libro havis en ĝi tre interesan sorton. El la jam riĉa kroata literaturo, esperantistoj por tradukado unue elektis tiun ĉi libron. Kaj ĝin tradukis al Esperanto pluraj personoj en diversaj jaroj!

La tradukojn faris la plej gravaj kroataj Esperantaj pioniroj Danica Bedeković (publikigo en 1909) kaj Mavro Špicer (1933), kaj iom malpli konataj Ivan Stalzer (1909 kune kun Bedeković) kaj Zlatko Hribar (ĉ. 1925, sed nepublikigita kaj nesavita). Fine la plej bona kaj verŝajne la definitiva traduko aperis en 1972 el la plumo de la elstara kaj tre kvalita kroata tradukanto Josip Velebit kaj recenzis ĝin alia elstara tradukanto Ivo Rotkvić!

La tradukoj de Špicer kaj Velebit saviĝis en malmultaj ekzempleroj. Mi do decidis meti ilin kune en unusolan libron. Por tion fari, necesis trovi la du tradukojn kaj ilin enkomputiligi. La taskon de retajpado prenis nia esperantisto Stanko Rukelj el Mäjerje. Li jam antaŭe enkomputiligis kelkajn valorajn tradukaĵojn el la kroata literaturo, sed pro lia modesteco homoj pri tio apenaŭ scias. Ekzemple, “La trezoro de l’ orajisto” el 1911 venis el lia komputilo al la paĝoj de KEL (www.esperanto.hr/citaonica.htm).

Post monatoj da lia tre atentema laboro mi finfine kunmetis ambaŭ tradukojn. La trian, tiun de Bedeković kaj Stalzer, cetere neniam komplete aperintan, mi lasis skanitan. Kaj la kvara traduko, tiu de Hribar, estas verŝajne delonge perdita.

Sed tio ne estas ĉio! Recenzoj, reklamoj kaj eĉ disputoj pri tiuj tradukoj aperadis en pluraj Esperantaj gazetoj. Sian opinion pri la tradukoj de Špicer kaj Velebit donis ankaŭ la famega hungara Esperanta poeto Kalocsay!

Venis al mi la ideo, savi por la kroata movada historio ĉion ĉi en unusola libreto. Estis tio tre ambicia projekto, kiun mi emas nomi “Projekto Mažuranić”. Cetere, post tri jaroj estos 200-jara jubileo de la naskigo de Ivan Mažuranić! Rememorigo por kroatoj: la bildo de tiu poeto troviĝas sur la banknoto de 100 kunaĵoj.

Mi kolektis ĉiujn tekstojn, difinis la enhavon, verkis la enkondukon kaj organizis la laboron. Krom la s-ano Rukelj, en la projekto kunlaboris ankaŭ Zdravko Seleš (kroatlingva kaj literaturhistoria kontrolo de la enkonduko) kaj per senpaga grafika preparo de la teksto kontribuis Josip Pleadin.

La tuta libro estas libere prenebla el interreto kaj presita provizore nur en 25 ekzempleroj. Post sendo al Nacia kaj Universitata Biblioteko kaj post donacoj al KEL, al la kunlaborantoj kaj al gravaj Esperantaj societoj en Kroatio, restos por vendado maksimume 10 ekzempleroj, je la prezo de 50 kunaĵoj.

Neniu el la kunlaborantoj celas ian ajn profiton el sia laboro. La mono kolektita per vendado iros al la eldonisto Esperanto-societo “Liberiga Stelo” el Osijek, por almenaŭ parte kovri la kostojn de la papero.

Do la libron vi trovu en http://www.esperanto.hr/smail_agao.pdf, kaj por eventuala aĉetado skribu al davor.klobucar@ht.hr

77-a INTERNACIA PEN KONGRESO POSTULAS: "LIBERIGU LA VORTON!"

Beogrado, de la 12-a ĝis la 18-a de septembro 2011

 Zlatoje Martinov

Sub titolo "**Literaturo – la mondlingvo**" en Beogrado okazis la 77-an Internacian PEN Kongreso kun partopreno de 83 PEN-centroj. Esperanto PEN estis reprezentita per du personaj: m-gro Zlatoje Martinov estis oficiala delegito kaj dr-ino Chiara Macconi (vidu la ĉi-apudan foton) havis pozicion de partoprenanto. Laŭ la vortoj de Internacia PEN prezidanto John Ralston Saul du gravaj eventoj simbolis la klopodojn de Internacia PEN ĉi jare. Mario Vargas Llosa, ricevis la Nobelpremion por la literaturo kaj Liu Xiaobo, ricevis Nobelpremion por paco. La unua estas granda novelisto, la dua eseisto kaj pacbatalanto. Ili ambaŭ estas advokatoj de libero kaj grandaj luktantoj por demokratio kaj liberaj pensprimoj. Je tia fundamento certe kuŝas la ĉefa PEN-ideo. Tial "Free the word" (Liberigu la vorton) fariĝis moto de la kongresa literatura festivalo.

Konforme al tio en multaj diskutoj oni substrekis la kontentecon ke la plejmulto da PEN-anon en plej diversaj PEN centroj de la mondo, ludis la gravan rolon en la ne antaŭlongaj publikaj eventoj: en la t.n. "araba printempo" kaj en Meksiko kie ni aj verkistoj per sia vorto serioze influis la okazaĵojn. Oni forte subtenis la liberigon de la popoloj en diversaj arabaj ŝtatoj, kaj same forte kondamnis la mortigojn de verkistoj kaj ĵurnalistoj en Meksiko dum lastaj monatoj.

La beograda kongreso denove aprobis la ideojn el Girona Manifesto pri bezono protekti la t.n. "malgrandajn" literaturojn, lingvojn kaj kulturojn. Tio kio novas, estas la sufiĉe korektaj diksutoj kaj polemikoj koncerne la temon. La reprezistantoj de la t.n. "grandaj" lingvoj kaj literaturoj ne atakis tiel akre la ideon protekti kaj helpi la evoluigon de la malgrandaj kulturoj kaj la tribaj afrikaj lingvoj kiel antaŭe okazadis. Nur la germana delegito kontraŭstaris la ideon rekomendante la anglan, germanan kaj eĉ la rusan lingvon kiel taŭgajn lingvojn por flua kaj senĝena komunikado. (La rusa delegito ne nur subtenis la ideon, sed aparte aldonis ke "ekzemple, la rusa bedaŭrinde ne estas oficiala lingvo en la beograda kongreso, oficialaj estas la serba, la angla, la franca kaj la hispana, sed la rusan lingvon parolas kaj almenaŭ komprenas ĉiuj slavaj landoj" (!)). La rusa povas, do, laŭ li, helpi la komunikadon en la tuta slava regiono. Ke tio ne estas vero intervenis mi, kvankam Esperanto PEN delegito, dirante ke mi kiel serbo ne parolas kaj tro



malmulte komprenas la rusan lingvon, ĉar mi dum mia edukado lernis nur la anglan kaj kompreneble Esperanton. Interese, la serbaj PEN-anoj ne komentis la alparolon de la rusa delegito!).

Aparte interesaj estis prelegoj koncerne la regionajn programojn de PEN centroj - kunlaboro en Afriko (komenciĝis en 2007), Latinameriko (en 2008), Azio kaj Pacifika regiono (en 2009).

Balkana regionreto estas fondita dum la beograda kongreso kaj ĝin konsistigas: Serbio, Kroatio, Bosnio kaj Hercegovino, Montenegro, Kosovo, Makedonio, Grekio, Bulgario, Rumanio kaj la lastan tagon de la kongreso aliĝis ankaŭ Cipro kaj Moldavio. Same dum la kongreso oni akceptis la Okcitanan PEN kiel rajtoplanan membron de la internacia PEN. Aparte interesa por balkanaj PEN centroj estis panelo kun reprezentantinoj de la aŭstria fonduso TRADUKI kiu mone ebligas eldoni multajn tradukverkojn de la balkanaj literaturoj. Tiel oni antaŭ nelonge eldonis ĝis hodiaŭ neimageblan libron: la dulingvan (serban kaj kosovalbanan) poeziantologion sub titoloj en ambŭ lingvoj, la serba kaj la albana: El Beogrado kun amo / El Prishtina kun amo. La interamika libera babilado dum la kafaŭzoj inter la reprezentantoj de la serba PEN kaj tiuj de la Kosovo-PEN, certe kontribuis al la bona etoso kiu regis dum la tuta Kongreso. (Mia demando kiu donis la nomon de la fonduso TRADUKI restis sen respondo, kvankam la reprezentantino de la fonduso sciis kaj oficiale deklaris ke temas pri la Esperanta vorto. Kiel delegito de Esperanto PEN mi esprimis mian kontentecon pri tiu fakto kaj aldonis

ke Esperanto kiel pontolingvo certe meritis ke la fonduso havu tian nomon).

Kial la kongreson oni nomu renoviga? Tial ĉar laŭ opinioj de multaj delegitoj el diversaj PEN centroj oni modernigis la komunikadon dank al novaj teknologiaj rimedoj, intencas plue daŭrigi kun tiaspecaj kontaktoj inter la PEN centroj de la mondo, preparis la fantaste organizitan retejon de Internacia PEN al kiu povas per siaj kontribuajoj aliĝi kiu ajn PEN centro. Same: protesti, laŭdi, proponi aŭ diri ion gravan al la Internacia PEN estraro nun estos pli facile kaj pli rapide.

"Ni devas estonte tiel labori ke oni ĉiam,

en ĉiu situacio havu la informojn pri nia laboro, kaj kontraŭe: ni rapide ekscios kio novas ĉe nia PEN-membraro. Tial mi opinias ĉi tiun kongreson vere renoviga"- diris la prezidanto John Ralston Saul.

Fine estis akceptitaj la jarraporto, la financa raporto kaj diversaj rezolucioj en kiuj oni defendas la rajton de la verkistoj esprimi sin sen timo kaj sen ŝtata teroro en diversaj landoj (Irako, Belorusio, Sirio, Eritreo, Irano, Meksiko, Turkio). Oni decidis ke la rezolucio kontraŭ la minacoj kaj persekutoj de la verkistoj kaj ĵurnalistoj far la meksika ŝtato, la PEN delegacio jam dum la kongresdaŭro enmanigu al la meksika ambasadoro en Beogrado.

KROATINOJ DIPLOMIĜIS EN POZNANO

Redakcia kompilo laŭ www.edukado.net

Ĉe la Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) la 17-an de septembro ekstudis nova grupo de 19 studentoj el 10 landoj, aparte dank al la stipendioj de ESF kaj de ILEI-UEA. La Studoj havas jam 13-jaran historion. Bedaŭrinde, inter la novaj studentoj troviĝas neniu el Kroatio. La unua sesio

komenciĝis por la novuloj per prelego de prof. John Wells pri sonsistemoj en la mondo kaj fonetiko de Esperanto, prof. Aleksander Melnikov diskutis la nocion kulturo kaj speciale la terenojn de Esperanto-kulturo, analizis la fonajn sciojn de tipa esperantisto, dum Lidia Ligeza pliproksimigis la poezion kaj Tomasz Chmielik la prozon de

la unua periodo de la Esperanta literaturo al la ĉeestantoj.

Paralele okazis ekzamenoj de 4 gestudentoj (el kiuj eĉ du kroatinoj!) finintaj la studadon kaj de 10 partoprenantoj de la unujara instruista trejnado. Sian laboraĵon titolitan "Kroataj lernolibroj de Esperanto kaj iliaj verkistoj" defendis Marija Jerković el Zagrebo kaj la laboraĵon titolitan "Tradukita kroata literaturo al Esperanto" Tea Radovanović el Rijeka. Laboraĵon pri "Maŝina tradukado kaj Esperanto" defendis Sean Healy kaj pri "Moderna informado kaj DVD kreita ĉe E@I" Petro Baláž. Ĉiuj kvar respondis ankaŭ al la demandoj de la ekzamenkomisiono.

En la grupo pri instruista trejnado ekzameniĝis Magdalena Feiřčová, Ildikó Joóné Ladányi, Gisela Macioszek, Arlette kaj Edmond Plutniak, Gizela Sklorz, Svetlana Smetanina, Petra Smidéliusz, Margaretha Symoens kaj Szilva Szabolcs).

La interlingvistikan sesion sekvis Interlingvistika Simpozio "Interlingvistiko kaj esperantologio antaŭ la defio de la 21-a jarcento", la 22-an kaj 23-an de septembro, kiun partoprenis kvindekda homoj el 15 landoj kaj organizis kaj gvidis prof. Ilona Koutny. Estis prezentitaj dudeko da prelegoj en kvar sekcioj: lingvistiko, metodiko, movado kaj literaturo.

Kiel kutime - la tuton finis la kultura aranĝo Arkones semajnfine kun pluraj prelegoj, spektakloj kaj koncertoj.



Marija Jerković (maldekstre) kaj Tea Radovanović (dekstre) kun prof. Ilona Koutny (meze).



VERKISTOJ EN HRAŠĆINA PRI JEROŠENKO KAJ BRONŠTEJN

 Zdenka Polašek

 Berislav Rubčić

Laŭ jam multjara tradicio, en la pitoreska vilaĝo Hraščina en la regiono de Zagorje, en la bieno de nia konata esperantistino Spomenka Štimec, la 17-an kaj 18-an de septembro ĉi-jare okazis la Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj, sub aŭspicio de Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio.

La vetero estis somere varma, kaj la belega biendomo inter la vinberejoj, de kie videblas la vasta regiono, donis ĝuindan travivaĵon. Jam frue antaŭtagmeze la unuan tagon alvenadis vizitantoj grupe aŭ unuope per aŭtomobiloj, kaj organizite per trajno el Zagrebo (dankon al samideano Bojana kiu tiel fervore ĉiam pretas organizi la grupvojaĝon). La plej multnombraj estis, memkompreneble, zagrebanoj, sed venis partoprenantoj ankaŭ el aliaj kroataj lokoj: Durdevac, Bjelovar, Varaždin, Osijek, Sisak, Križevci ...

Bonvenigis nin la afabla dommastrino per varmaj "strukloj" (fromaĝkuko, specialaĵo de la regiono, nacilingve nomataj "strukli") kaj kafo, post kio sekvis rigardado de la bieno, dum

kiu la hejmmastrino estis nia ĉiĉerono. Mallonge ŝi konigis al ni la historion de la konstruaĵo, montris al ni ĉiujn ejojn: kuirejon, dormoĉambrojn, salonon, bibliotekon, kelon, ĉion ekipitan per aŭtoktona meblaro kaj objektoj el pasintaj jarcentoj.

La unuan tagon, la 17-an de septembro, la ĉeftemo de la renkontiĝo estis omaĝo al Vasilij Jeroŝenko (1890-1953) kaj la preleganto estis verkisto Mikaelo Bronŝtejn el Rusio, el kies romano "Dek tagoj de kapitano Postnikov" ni havis okazon vidi ĉapitron sursceneje prezentitan en la programo de la 9-a kongreso de kroataj esperantistoj en Bjelovar. La sama preleganto gvidis paroligan rondon por ĉeestantoj, post kio sekvis abunda pikniko.

Ni eksciis multajn interesajn pri Esperantlingva blinda verkisto Vasilij Jeroŝenko, pri kiu vi povas legi en la pasinta numero de "Zagreba Esperantisto" (3/2011). Aparte interesa estis la temo pri la ĉina verkisto Wang Luyan, pri kies signifo por kroataj parolis Spomenka Štimec.

En la programo tri verkoj de Mikaelo Bronŝtejn estis prezentitaj. Kruno Puŝkar

el Križevci prezentis la romanon "Oni ne pafas en Jamburg", "La lecionoj por geknaboj" estis prezentita de Maja Valentić el Ivanić Grad kaj "La urbo Goblinsk" de profesoro Zdravko Seleš el Durdevac.

Aparte al mi plaĉis la programparto en kiu ni aŭdis pri la kvar Esperantaj tradukoj de la verko de Ivan Mažuranić "La morto de smail-ago Ĉengiĉ", prezentitaj de Davor Klobuĉar el Osijek kaj Stanko Rukelj el Petrijanec.

En la programon estis envicigita ankaŭ koncerto de nia juna esperantistino Kaja Farszky, la ĵusa diplomiginto de Muzika akademio - fako pri perkutinstrumentoj. Anstataŭ su marimbo, ŝi brile prezentis sur argilaj potoj "La Odon al Homero", kiun al Esperanto tradukis Lucija Borčić. La sama muzikero estis prezentita ankaŭ en ŝia diplomkoncerto, nur tagon pli frue, la 16-an de septembro en Zagrebo. Aldone al tiel perfekta sukceso ni eksciis, ke Kaja Farszky kaj Kruno Puŝkar estis gajnintoj de la Rektora premio atribuita al la plej sukcesaj studentoj.

Kun oreltuŝaj gitarsonoj kaj kantado de la koncertinta Mikaelo Bronŝtejn, ni pasigis la tempon ĝis vesperaj horoj, kiam, bedaŭrinde, ni devis forlasi ĉi tiun magian lokon, la ĝustan lokon por similaj aranĝoj.

Ĉi tiu artikolo estas nur mia persona impresio pri la aranĝo, la impresio de esperantistino al kiu literaturo ne estas aparte bone konata. Mi esperas, ke siajn opiniojn esprimos ankaŭ pli bonaj konantoj de literaturo. Sed, honeste dirite: mian gratulon pro la bonaĵoj kaj organizado!

- ←
- ① Spomenka Štimec kaj Mikaelo Bronŝtejn prezentas la blindan poeton Vasilij Jeroŝenko.
 - ② "La Odon al Homero" prezentas sur argilaj potoj Kaja Farszky.
 - ③ Partoprenintoj de la ĉi-jara Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj en Hraščina.
 - ④ La riĉa pikniko altiris ĉiujn al la tablo.
 - ⑤ Profesoro Zdravko Seleš parolas pri "La urbo Goblinsk".
 - ⑥ Stanko Rukelj kaj Davor Klobuĉar prezentas la novan Projektan "Mažuranić".
 - ⑦ Pri la romano "Oni ne pafas en Jamburg" parolas profesoro Krunoslav Puŝkar.
 - ⑧ Maja Valentić prezentis "La lecionojn por geknaboj".

GABRIJEL DIVJANOVIĆ (1913-1991) BRILANTA STELO DE NIA FIRMAMENTO



Gabrijel Divjanović koincide naskiĝis en la slavonia urbo Našice, la devenurbo de Mavro Špicer, pioniro de Esperanto en Kroatio. Ili ambaŭ lasis profundan kaj neforviŝeblan spuron en la kroatia Esperantomovado.


Divjanović devenas el unu el la plej malnovaj familioj de Našice, kie la taglumon li ekvidis la 22-an de marto 1913. La morto trafis lin antaŭ du jardekoj, la 27-an de julio 1991 en Zagrebo, kie li realigis la plej brilan parton de sia kariero.

Se en Kroatio oni parolas pri astronomio, neeviteble oni devas mencii ankaŭ lin, doktoriĝintan scienciston kaj multjaran direktoron de la zagreba observatorio. Pri Divjanović, la akademiano Fran Tučan diris, ke **"post la forpasinta Oton Kučera, li estis la plej amasa populariganto de la scienco en Kroatio"**.

Fininte popollernejon en sia naskiĝurbo, li frekventis

gimnazion kaj studis juron en Zagrebo, kie li diplomiĝis kaj doktoriĝis pri jurscienco, sed lia malnova amo restis astronomio, al kiu li dediĉis multe da tempo kaj laboro. Kvankam ekde 1942 li kiel partizano partoprenis en la kontraŭfaŝisma batalo, kaj estis tre proksima kunlaboranto de la postmilita reĝimo en rolo de helpanto de ŝtata prokuristo, pro siaj politikaj starpunktoj li estis punita kaj verdiktita al punlaboro en la fifama koncentrejo por politikaj persekutitoj en la insulo **Goli otok**. Post tio li por ĉiam forlasis la politikajn kaj armeajn funkciojn kaj laboris en la Ministerio de klerigo, fariĝis direktoro de Ŝtata instituto por protektado de naturaj rarajoj de Popola Respubliko Kroatio kaj sekretario de Kroata natursciencia societo. Li dediĉis sin al laboro kun gejunuloj, al fakaj prelegoj pri astronomio, verkado de artikoloj kaj redaktado de astronomiaj gazetoj, ofte uzante la pseŭdonimojn **Veseljko Barić** kaj **Bartol Papučić**. Aparte grava estas lia redakta laboro


✍ *Josip Pleadin*



en la kroatingva astronomia gazeto **"Ĉovjek i svemir"** kaj ĝia Esperantlingva varianta **"Homo kaj Kosmo"**, kiu aperadis inter 1963 kaj 1984 ĉe la zagreba observatorio. Li redaktis plurajn natursciencajn librojn en la kroata, kaj inter esperantistoj famiĝis la Esperantlingva eldono de **"Tragedio en la Universo"**, la verko de junaj astronomoj-esperantistoj, verkita en la kroata, kaj Esperanten tradukita de la akademiano Ivo Rotkvić. Ĝi aperis antaŭ duonjarcento, en 1961. **Fra Sreĉko Majstorović** pri li diris: **"Divjanović estas astronomo-filozofo, kiu el la universaj perspektivoj solvas la terajn problemojn. El liaj prelegoj foriras aŭskultantoj en la ĉiutagan vivon plenaj je sanaj observoj kaj solida humaneco"**.

Multfoje premiita por popularigo de naturscienco, kaj de esperantistoj honorita per la titolo "mondĉivitano", li neniam transpaŝis la limojn de sia patrujo, ĉar la aŭtoritatoj forprenis lian





Primošteno

pasporton.

Ne eblas distingi kiu el liaj pasioj estis pli forta: ĉu pri astronomio, ĉu pri Esperanto, sed estas evidente, ke li tre sukcese kombinis unu kun la alia.

En 1961 li Esperantlingve kunverkis kun D-ro Milovan Ljubić la libreton **"Totala suneklippo 15.II 1961"**, kiun eldonis Kroata naturscienca societo en Zagrebo kiel ekstran eldonon, kaj kiun redaktis Ivo Rotkvić. El tiu libreto ni ekscias pri la ampleksa agado de junaj astronomoj esperantistoj, kiuj organizis ekspedicion por rigardi

suneklipson el la dalmatia marbordo. Ili verkis la libron **"Tragedio en la Universo"**, kaj eĉ preparis scenaron por originala filmo en Esperanto, uzanta kiel sian bazon unu ĉapitron de tiu libro. Ekde 1960 ili okazigis regulajn Esperantajn prelegojn en la Observatorio pri astronomio (la unua okazis la 27-an de oktobro 1960), ili proponis al la Soveta Akademio de Sciencoj eternigi la nomojn de "Zamenhof" kaj "Esperanto" en la kosmo, funkciigis la propran Esperanto-radiostacion kaj, kio montriĝis tre grava en postaj jaroj, fondis la

Esperanto-kampadejon, komence nomitan "Esperantujo", en la urbeto Primošteno, kiun ili vizitis dum sia astronomia ekspedicio al kroata marbordo. La kampadejo estis fondita antaŭ duonjarcento, en 1961, kaj ĝi signifis komencon de turismo en tiu urbo, kion nuntempe agnoskas la urbaj instancoj kaj notas tion en sia oficiala retpaĝaro.

Primošteno ekde 1961 fariĝis Mekko por tutmonda esperantistaro, pro sia situo ĉe la suda maro kaj pro siaj Esperanto-kursoj. Jam en 1962 Kroata naturscienca societo el Zagrebo



preparis specialan dulingvan libreton titolitan "Kampadejo de pacamikoj sur la bordo de Adriatiko", kiun redaktis Erik E. Salberg kaj Gabriel Divjanović, kaj kiu enhavas artikolojn pri tiu fenomeno aperintajn en la Esperanta gazetaro. Tamen, la plej granda amiko de la kampadejo en Primošteno fariĝis la aŭstria esperantisto Hugo Kraus, kiu en 1963, kunlabore kun la Turisma societo de Primošteno kaj la zagreba observatorio, verkis la libreton "Feliĉigaj ferioj". La epoko de Divjanović daŭris ĝis post lia morto, kaj pro la amasa turismo al kiu esperantistoj ne povis konkurenci, malaperis la idlia kampadejo en Primošteno.

Pri la gravaj jubileoj menciitaj en ĉi tiu artikolo, atentigis la estraron de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj Zdenka Polašek el Bjelovar, kaj aparte interesan fakton oni alfrontis per trovo de la revuo "Globusoj", pri kiu ĝia redaktoro Dominik Bertrand el Jouy-sur-Morin (Francio) skribas la jenon: ***La revuo "Globusoj" estas spirita ido de "Homo kaj Kosmo". Ni tute konsentas kun la diritaj opinioj pri paco, homaro, ktp. de Gabriel***

Divjanović, liaj amikoj kaj la junaj esperantistoj astronomoj de la observatorio de Zagrebo, kiuj tiom multe aktivis antaŭ preskaŭ kvindek jaroj. Vi nepre legu la ankoraŭ ege interesajn numerojn de "Homo kaj Kosmo"! "Globusoj estas plua paŝo al popularigo de praktika scienco kaj de larĝskala uzado de ties metodoj.

Ĉio ĉi instigis la estraron de UZE pripensi: ĉu ni lasos la tutan gamon da eventoj okazintaj ĉirkaŭ Gabriel Divjanović kaj lin mem nerimarkitaj? Ĉu ni permesu ke li kaj la rezultoj de lia penado dronu en la abismo de forgeso? La respondo estis unuanime: ***NE!*** UZE devas honorigi lin kiel grandulon de la kroacia kaj monda Esperanto-movado. Ĉi tiu artikolo estas nur guto en la puto, kaj apartan programon UZE planas okazigi komence de decembro en Zagrebo. Bonvenas ĉiuj kiuj en sia koro konservis belajn memorojn pri tiu epoko. Bonvenas ankaŭ vi, karaj legantoj, per viaj reagoj al tiu ĉi artikolo. Sendu al ni viajn memorojn, fotojn, filmojn, kiujn ni uzos por prepari apartan libreton kaj por daŭre konservi ilin en Dokumenta Esperanto-Centro.

La 84-a SAT-kongreso, okazinta en Sarajevo de la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto 2011, kiun partoprenis 74 kongresanoj el 16 landoj, rikoltis neatendite grandan sukceson.

La kongreso okazis sub la protekto de la urbestro de komunumo Ilidža, prof. d-ro Senaid Memić kaj kun subtenoj de la Registaro de Kantono Sarajevo, ĉefurbestro de Sarajevo kaj la Ligo de sendependaj sindikatoj de Bosnio kaj Hercegovino. La kongresa programo plejparte okazis en hotelo "Terme", en la sarajeva banloko Ilidža, kie estis loĝigitaj ankaŭ la partoprenantoj de la kongreso.

La protektanto de la kongreso prof. d-ro Senaid Memić ĉeestis la solenan malfermon de la kongreso kaj organizis akcepton por ĉiuj kongresanoj la 4-an de aŭgusto en salono de hotelo "Terme".

La kongresa programo konsistis el labora parto, seminario pri la kongresa temo, kongresaj prelegoj, kulturaj programoj, lokaj kaj tuttagaj ekskursoj.


La labora parto de la programo konsistis el ĝeneralaj kunvenoj, kunsidoj de ĝenerala konsilantaro kaj plenumkomitato de SAT kaj frakciaj kunvenoj. Krom la kongresa rezolucio, ĝenerala kunveno de la kongreso akceptis apelacion por senminigo de Bosnio kaj Hercegovino kaj apelacion por subskribo de Konvencioj el Otavo (1997) kaj Oslo (2008), kiuj malpermesas produktadon de kontraŭpersonaj minoj kaj de kaseda municio, senditaj al ambasadoj de Rusio, Pakistano, Ĉinio kaj Usono. La apelacioj estis publikigitaj dum la pac-kunveno okaze de la ekskurso al Srebrenica.

La kongresa temo "Tutmondiĝo kaj nacia fenomeno" estis pritraktita en du sesioj kadre de la seminario kiun gvidis prof. d-ro François Lo Jacomo.

En la kleriga kongresa programo estis organizitaj kvar

ĈU VI DEZIRAS RICEVI ĈI TIUN NUMERON DE "GLOBUSOJ"?

La redakcio de "Globusoj" disponigis al ni senpagajn ekzemplerojn por distribui ilin al interesigantoj pri sciencaj temoj. Se vi estas tia, sendu al ni retmesaĝon. Deko da plej rapidaj legantoj ricevos perpoŝte la interesan legajon.



Nia adreso:
zagreba.esperantisto@gmail.com



SAT-KONGRESO EN SARAJEVO: PROGRAMRIĈA KAJ ETOSĜUINDA

 Fetah Zvirac

apartaj kongresaj prelegoj. Vito Markovo parolis pri kinezoterapio, prof. d-ro Samir Ribić pri komputila operacia sistemo en ĉies lingvo, ing. Pavlin Boevski pri sorto de fervojo kaj fervojistoj antaŭ kaj post 1990 kaj prof. d-ro Nikolao Gudskov pri demando kial kaj kiel verki sciencpopularajn librojn en Esperanto.

Okazis ankaŭ libro-prezentoj. Dum la ekskurso al Mostar la verkistino Spomenka Štimec en Blagaj prezentis sian romanon "Hodler en Mostar" kaj en la hotelo "Terme" Senad Čolić prezentis libron - kolekton de prelegoj kaj diskutintervenoj de la simpozio "Eŭropa unio - lingvaj kaj kulturaj aspektoj", okazinta en Sarajevo en 2010.

La kultura programo de la kongreso konsistis el pluraj aranĝoj. Dimanĉon, la 31-an de julio dum fermo de la publika kultura manifestacio "La noktoj de Baščaršija" partoprenis muzikisto el Francio kaj kongresano Lino Markovo kantante sevdalinkon^{*} en Esperanto. Lundon, la 1-an de aŭgusto, la kantistino, solistino de Sarajevo opero, Lejla Jusić koncertis pri "Societumado kun sevdalinko". Mardon, la serbia aktoro Saša Pilipović prezentis teatraĵon "Rememoro de unu aktoro". Merkredon estis prezentita filmo "Esperanto". Jaŭdon okazis Internacia kultura vespero kun muzika programo prezentita de Lino Markovo, kantoj de internacia koruso sub gvido de s-ino Franjo Leveque kaj voĉlegado de aforismoj de Dinko



Matković. Vendredon okazis folkloro vespero sur la somera scenejo en Ilidža, kie kulturarta societo "Ekrem Mujkić" el Ilidža prezentis bosniajn popolajn dancojn kaj kantojn.

La kongresanoj amase partoprenis lokajn kaj tuttagajn ekskursojn. Lokaj ekskursoj estis organizitaj al malnova urbo de Sarajevo (Baščaršija), al sarajeva milita tunelo, al piramida valo en Visoko kaj promene al fonto de rivero Bosna. Dum la tuttaga ekskurso al Mostar kaj Blagaj, la partoprenantoj vizitis faman novan-malnovan ponton kaj malnovan kvartalon en Mostar kaj la faman fonton de rivero Buna en Blagaj. La ekskurso al Srebrenica konsistis el vizito al memor-centro en Potočari, publika pac-kunveno kaj vizito al pordego en Tuzla, kie okazis la konata masakro de civiloj dum la lasta agreso al Bosnio kaj Hercegovino.

Estis organizita ankaŭ postkongreso inter la 6-a kaj la 10-a de aŭgusto sub la titolo "Ĝuu en Hercegovino". Ses kongresanoj

dum kvin tagoj vizitis tre interesajn vidindaĵojn apud la rivero Neretva (Glavatiĉevo, lago Boraĉko jezero, urbo Konjic), la malnovan urbon Poĉitelj, la urbon Ljubuški (akvofalo Kravice), la naturan faŭnan kaj flaŭran rezervejon Hutovo Blato, la malnovan urbon Dubrovnik en Kroatio kaj la urbon Trebinje.

Amaskomunikiloj, radio, televido, tagjurnaloj, gazetoj, retportaloj kaj bultenoj de novaj agentejoj publikigis plurajn informojn okaze de la SAT-kongreso. La membroj de la Organiza kongresa komitato kaj funkciuloj de SAT faris plurajn intervjuojn por amasmedioj kaj en la sidejo de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino funkciis manaĝero por publikaj rilatoj organizante kaj plenumante specifajn postulojn de ĉiu unuopa amasmedio.

^{*} *sevdalinko* - bosnia popola amanto kiun karakterizas melankolio, fortaj emocioj kaj pasio

KAJA FARSZKY HAVIS DIPLOMKONCERTON

Studentino pri perkut-instrumentoj de Muzika akademio de Zagrebo, membrino kaj eksprezidantino de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo Kaja Farszky, okazigis sian diplomkonzerton la 16-an de septembro en *Scena Travno* helpe de Internacia Kultura Servo en Zagrebo. La 17-an de septembro ŝi gastis en la Renkontiĝo de Esperantlingvaj verkistoj (vidu la raporton aliloke en ĉi tiu numero).



ANKORAŬ UNU MEMORTABULO AL JOSIP VELEBIT

La 4-an de oktobro la filio de *Matica hrvatska* en Zapreŝić starigis memortabulon sur la nuntempan Metiistan domon, en kiu vivis Josip Velebit dum 1960-aj jaroj. La tabulon malkovris la departamentestro Stjepan Kožić. Samvespere je la 17h30 en Elementa lernejo "Antun Augustinčić" en Zapreŝić okazis ekspozicio kaj ronda tablo pri la vivo kaj verko de Josip Velebit kun prezentintoj Tonko Maroević, Stjepan Laljak, Ranka Novosel, Branko Čegec, Spomenka Štimec, Lada Kos, Miroslav Živković kaj Stanko Radiković.

LUCIJA BORČIĆ 90-JARA

Honora membro de UEA kaj unu el la plej meritaj kroataj esperantistinoj, Lucija Borčić, la 26-an de julio ĉi-jare atingis la aĝon de 90 jaroj. Malgraŭ la jaroj, ŝi daŭre aktivas tradukante kaj verkante. Unu el la lastatempaj tradukoj estis Esperantigo de "La Odo al Homero", kiun ŝi preparis por la diplomkonzerto de Kaja Farszky.



D-RO VELIMIR PIŠKOREC REGULA PROFESORO

La 13-an de septembro ĉi-jare, d-ro Velimir Piškorec fariĝis regula profesoro de Fako pri germanistiko de Filozofia fakultato en Zagrebo. Kiel konate, d-ro Piškorec gvidas kolezion "Interlingvistiko kaj strukturo de Esperanto" en la Fako pri germanistiko. Laste li akceptis la membrecon en la Organiza komitato por la 10-a kongreso de kroataj esperantistoj en Koprivnica, en kiu li prizorgos simpozion dediĉitan al la 125-a datreveno de Esperanto, organizotan enkadre de la kongresa programo.



PREMIO POR VIVOVERKO AL DINKO MATKOVIĆ

En la solena kunsido de Komunumo Jelsa (insulo Hvar) okazinta la 11-an de aŭgusto okaze de la Komunuma tago, la komunuma prezidanto Ivan Grgičević transdonis premiojn al meritaj civitanoj. Inter la premiitoj troviĝis ankaŭ la veterana esperantisto Dinko Matković el Vrboška (sur la malsupra foto la tria de maldekstre), premiita por vivoverko pro afirmado de la ĉakava dialekto kaj Esperanto.





“Denove pri Fran Kolar-Krom” (ZE 2/2011, paĝo 59)

Jam delonge mi legas vian revuon, kiun mi tre aprezas. Hodiaŭ tagmeze el mia leterkesto mi elprenis “Zagreba Esperantisto”-n, kaj ne havante tiom da tempo, tre rapide mi jetis rigardon al ĝi, ĝis lasta paĝo, kaj je la fino mi malkovris, ke mia samideanino Laura havigis al vi la gedziĝ-ateston de Kolar kaj Godina: do, mi dankis tiun mian scivolemon pri enhavo de via ŝatata revuo. Sed intertempe, kaj jam de unu monato kaj duono kuŝas ĉe mi atestilo pri naskiĝo de Luigia Godina kaj ties filino Breda Kolar, kaj civila stato de Luigia. La komunuma oficistino interalie diris al mi, ke Francesco Kolar neniam loĝis en Triesto, tial nenie li rezultas esti registrita. Per ordinara poŝto mi sendos al vi la dokumenton, kie krom la ordinaraĵ donitaĵoj, kiujn certe vi sukcesos kompreni, estas jenaj notoj, enkadrigitaj: 1) edziniĝinta kun Kolar Francesco, 1-2) forigitaj de la registro-libro de loĝantaro en Triesta Komunumo pro iro al Jugoslavio je dato 17/12/1931. Estas ĉio kion mi trovis.

Elda Doerfler (Triesto, Italio)

“Homo kaj Kosmo” kaj la verko de Gabrijel Divjanović

Ĉu vi scias, kiel kunligi en via regiono scienc-amantojn, homojn, kiuj bedaŭras la malaperon de “Homo kaj Kosmo”? Mi kelkfoje relegas la unuajn numerojn: ĉu vere ĉio tio okazis? Ĉu eblas? Kial nenie plu okazas fakaj aferoj tiel naivaj, sinceraj, ambiciaj, revigaj, frenezetaj sed bonkoraj? Mi provis en 2009 kontakti la Observatorion de Zagrebo. Iu respondis al mi, per la angla, ke li serĉos, sed konis tie nenium esperantiston. Mi provis kontakti ankaŭ landan Esperanto-asociacion. Neniu respondis. Cetere mi rimarkis, ke en ties retpaĝaro aperis nenia aludo al la Divjanović-aj atingoj! Zagrebo famiĝis en la tuta universo per la plej grandega projekto de la tuta homaro, kaj ... nenio plu; nur forviŝo. Mi sendis al vi plurajn ekzemplerojn de la revuo “Globusoj”, kiu estas spirita ido de “Homo kaj Kosmo”, por ke vi disdonacu ilin pere de “Zagreba Esperantisto” al aliaj esperantistoj.

Dominik Bertrand (Jouy-sur-Morin, Francio)

“Du jardekoj de sendependa Kroatio” (ZE 3/2011, paĝo 67)

Hodiaŭ atingis min la nova numero de ZE. Mi tuj trafolumis ĝin kaj mian atenton kaptis du artikoloj: la enkonduka artikolo de Radenko Milošević pri dudekjariĝo de Kroatio, kies festadon ankaŭ mi kun intereso sekvis dumtempe, kaj la notoj de Josip Pleadin pri almenaŭ kvar kroataj esperantistoj falintaj por la liberiĝo de Kroatio. Gratulojn!

Bardhyl Selimi (Albanio)

“Hungaroj omaĝis al Julio Baghy” (ZE 1/2011, paĝo 13)

Mi finlegis tri numerojn de via gazeto dum mi estis en hospitalo. La gazeto estas bonega, kaj mi tre ĝuis legante, sed mi havas rimarkon pri la artikolo de s-ino Jolanda Józsi el Braŝovo, Rumanio. Mi devas korekti la aŭtorinon kaj atentigi, ke s-ro Jozefo Baksa ne estas vicprezidanto de la Hungaria Esperanto -Asocio. HEA havas du aliajn personojn en tiu funkcio. La ĝenerala vicprezidanto estas s-ro Ferenc Harnyos, kaj la ekonomika vicprezidanto estas János Nagy.

Adri Pásztor (Miskolc, Hungarujo)

KELKAJ ĜENERALAJ OPINIOJ PRI "ZAGREBA ESPERANTISTO"

“Zagreba Esperantisto” estas movada gazeto, kaj tia ĝi restu, laŭ mia prefero. Mi ne tro aprezas kiam ĝi provas anstataŭi la gazetojn “El Popola Ĉinio” aŭ “Nuntempa Bulgario” kroatmaniere. Krom tio, vi redaktas unu el la plej bonaj movadaj revuoj nuntempe. Sed se vi nepre planas skribi pri nia lando eble faru tion laŭ analiza kaj kritika maniero. Homoj nuntempe ja ĉiukaze sekvas kio okazas ĉie ajn. Vi informas nin brile pri kio okazis en mezepoko sed praktike nenion pri kio okazas antaŭ la elektoj, do nun. Kiel mi jam diris, mi preferus nenium vorton pri politiko, sed se vi tamen volas, faru ĝin tiel ke ĝi estu leginda kaj donu informon utilan kaj orientigan, laŭeble ne unuflankan, sed ĵurnalisme neŭtralan.

Nikola Rašić (Rotterdam, Nederlando)

Mi kelkfoje rigardis kaj ĝue foliumis vian valoran gazeton. Denove mi pensis pri via bela lando kaj vigla Esperanta movado. Ĝojige, ke via gazeto estas bonkvalita, riĉa je informoj, kvalita je stilo kaj bildoj. Mi eksciis interesajn kaj abundajn novaĵojn el la verda mondo. Vespere mi denove foliumos ilin kun agrablo ...

Nijolė Petraitytė, (Šiauliai, Litovio)

Mi ricevis provnumeron de via revuo kaj tralegis ĝin. Koran dankon. Kelkaj paĝoj, ĉefe kulturaj, preparolantaj vian landon estas treege legindaj. Tamen ili dronas en la duongravaĵoj kiel raportoj pri ĉaspecaj kongres(et)oj, kunvenoj, kunsidoj, ktp. La bonkvalita papero kaj kolore presitaj bildoj iomete kontrastas disde la griza enhavo de tiuj raportoj. Mi tute ne intencas kritiki vian laboron, mi nur klarigas, kial mi, bedaŭrinde, ne abonos la revuon.

Yenovk Lazian (Augsburg, Germanio)

Plezuro por palato kaj por intelekto

Faru al vi kelkajn momentojn de ripozo, pasigu tempon en ĉarma loko kaj permesu esti kaptita de Esperantaj gustoj. Tiel devas aspekti reklamsildon de la unua Esperanto-Kafejo en Germanio.

Tiu escepta loko situas en la koro de Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, ĉe la Cefstrato n-ro 38, en Ginsengo-Butiko. Ĝi jam de la enirejo faras neordinaran impreson, kiun pliiĝas la en ĝi reganta neripetebla etoso. Ĝi estas ideala loko por renkontiĝoj kun amikoj aŭ rendevuo en la centro de la urbo. Zorge elektata muziko enkadrigas la vizitanton en kvietan agordon kaj permesas foririĝi de ĉiutageco ĉe bongustaj Esperanto-kuko, kafo, teo aŭ speciale kreitaj Esperantaj-trinkaĵoj.

La nekutima kafejo ekestis dank' al internacia geedza paro vivanta en Herzberg, nome Harald Schicke (germano) kaj Song Jeong-ok (koreino). La ideo pri la Esperanto-Kafejo aperis iun tagon kiam Harald kaj Jeong-ok, sidinte en la korto de la Ginsengo-Butiko, babiladis kun esperantistoj. Post longa rezonado Jeong-ok finfine opiniis, ke la nomo Esperanto-Kafejo estas la plej taŭga nomo por kafejo en la Esperanto-urbo.

Harald kaj Jeong-ok mi ekkonis dum mia 10-monata staĝado en Herzberg kadre de Grundtvig-Asistanteco kaj dum tiu tempo mi ofte ilin vizitadis. Jeong-ok estas majstrino en kreado de agrabla etoso dum kiu oni forgesas pri ĉiaj ĉagrenoj. Ŝi ĉiam bonvoleme, kun bela rideto kaj sen rapideco, okupiĝas pri siaj gastoj. Energion kaj entuziasmon donas al ŝi, kiel ŝi mem forte substrekas, regula trinkado de korea ginsengo. Cetere en Ginsengo-Butiko oni trovas dekuon da koreaj teoj malofte troveblaj aliloke.

Sidinte ĉe la kaftableto en Esperanto-Kafejo kun miaj amikoj kaj trinkinte kafon el freŝe muelitaj kafograjnoj, rostitaj de konata firmao Schirmer, mi ekmeditis pri la demando: Kio nuntempe por ni estas kafo? Certe nuntempa trinkado de kafo jam ne estas nur alkitumiĝo sen kiu multaj ne scipovas komenci sian tagon aŭ nur preteksto por renkontiĝi kun iu ... Kafo estas io pli. Tio estas pasio, inspiro, aventuro, malkovrado de novaj impresoj, agrableco de gusto kaj aromo ... Guste tia estas la kafo, kiun oni trinkas en la Esperanto-Kafejo en Herzberg.



Malgosia Komarnicka

Dum la tiea longa renkontiĝo mi gustumis ankaŭ *Esperanto-kukon*. Ĝi venas el Koreio, estas korea glurizkuko kun cinamo, ternukso, migdalo, jujubo, juglando kaj pinsemoj, nature kolorigita per artemizio, kiu al ĝi donas la kompreneblan verdan koloron.

Dum la gustumado de Esperanto-kuko Harald preparas *Verdulon* kaj Jeong-ok Verdulinon, du Esperantajn trinkaĵojn. La Esperantaj trinkaĵoj estas verdaj kaj internaciaj samkiel Esperanto. *Verdulo* konsistas el bio Green magma, ekstrakto el hordeaj folietoj, kreita de japano d-ro Hagiwara, bio pomsuko kaj minerala sengasa akvo. *Verdulino* enhavas la samajn ingrediencojn, sed ĝi estas farita sen minerala akvo. Ambaŭ estas bongustaj kaj sanaj, ĉar por ilia preparado oni uzas nur tre bonajn produktojn. Tiu pulvoro estas tute verda kaj tial la Esperantaj trinkaĵoj havas verdan koloron. Harald kaj Jeong-ok eksperimentante kreis la receptojn de bongustaj trinkaĵoj. *Verdulo* estas malpli dolĉa kaj pli plaĉas al Harald, kaj *Verdulino* estas pli dolĉa kaj ĝi pli plaĉas al Jeong-ok.

La aspekto de la Esperanto-Kafejo ne estas ankoraŭ finita. Baldaŭ sur la muroj de la kafejo aperos la informoj pri Esperanto. Ili estos ĉefe en la germana lingvo. Tiel turistoj senĝene lernos ion pri la utilo de Esperanto.

Ĉekafeja ĝardeneto estas vera trafo. Ĝi permesas rilati kun la naturo, malstreĉiĝi kaj ripozi. Demandante pri planoj por la estonteco kaj Harald kaj Jeong-ok preskaŭ samtempe respondas: Daŭrigi la laboron per Esperanto.

Nepre vizitu ĉi tiun esceptan lokon, ĝuu ekscelentajn gustojn kaj pasigu agrablajn momentojn inter amikaro.



... en Esperanto-Kafejo en Herzberg